
# internacia jaro de la junularo 1985




MONDA FESTIVALO
DE JUNULARO KAJ STUDENTARO
MOSKVO * 1985-07/27-08/03

© Klement '84

E
1984·6·105
starto




KURACA SANATORIO J. FUČÍK
TEPLICE v Čechách

NOVA KURACA DOMO PRO MALSANOJ
DE LA MOVEBLAJ ORGANAROJ

INFORMOJ SENDOS KAJ CERTIGOS
KURACADON

BALNEA

BALNEA, reprezentace československých lázní a zřídel,

110 01 Praha 1, Pařížská 11, tel.: 263777, telex: 122 215


## INFORMA KOMISIONO DE ĈEA RAPORTAS...

### Pli da informoj - malpli da propagando

nuntempe estas tutmonda trajto ankaŭ en komerca reklamo. Same ni uzu la argumentojn el nia internacia oficiala revuo ESPERANTO por plialtigi nivelon de nia informa laboro.

Gloran 40-jaran jubileon de liberigo de Ĉeĥoslovakio antaŭiras la 30-jara jubileo de la Unesko-rezolucio pri Esperanto /1954-12-10/ kaj la 125-jara jubileo de naskiĝo de d-ro Zamenhof /1859-12-15/. Ni turnu nian atenton al la unua jubileo - al tiu de la Unesko-rezolucio pri Esperanto. Ĝi fakte estas grava - kaj nuntempe ankaŭ aktuala afero. En la maja numero /941 - 5/1984/ ESPERANTO alportas interesan legaĵon de la vicprezidanto de UEA d-ro Humphrey Tonkin "Unesko travivos la nunan krizon" /pĝ. 81-82/. Laŭvorte tie estas skribite: "UEA trovas multon komunan /kun taskoj de Unesko - rim. -jkt-/ kaj certe - kun aŭ sen Usono... - UEA daŭrigos sian kunlaboron kaj rikoltos la ĉi-rilatajn avantaĝojn. Unesko travivos la nunan krizon. Nia laboro tie estas egale grava, eĉ pli grava ol antaŭe." Kompare kun la artikolo estas ankaŭ interesa la redakcia noto sur la pĝ. 80, finiĝanta per vortoj: "Ĉu ni povus vendi tiun recepton ankaŭ al Usono? Malfacile, ĉar en la mondo ankoraŭ pli gravas la usona mono ol niaj spertoj kaj konsiloj." Temas pri iama neglekteco de Unesko pri la monda lingvoproblemo: per persista laboro de simplaj esperantistoj, kiuj nur ĝis la j. 1949 kolektis preskaŭ 16 milionojn da subskriboj sub la peticio pri Esperanto al Unesko, UEA venkis tiun ĉi mankon en laboro de Unesko ĝuste antaŭ 30 jaroj. - Aliajn koncernajn interesaĵojn vi povas legi en N-ro 946 /10-1984/ en la artikolo "Tridek jaroj post Montevideo" de Ralph Harry, iama ambasadoro de Aŭstralio en UNO.

La tuta numero 945 /9-1984/ de la revuo ESPERANTO estas dediĉita al la 69-a UK en Vankuvero. Ĝi montras, ke malgraŭ malalta partopreno la lasta UK estis altsignifa pro siaj konkludoj. Ne ŝajnas al mi ĝuste ĝenerale bagateligi la Kongreson. Ekzemple la kongresa rezolucio, publikigita sub titolo "Por lingva demokratio en internaciaj rilatoj", fakte subtenas nepran efektivigon de la Fina Akto de la Europa Konferenco pri Sekuro kaj Kunlaboro aprobita en Helsinki 1975 - nome ties ĉapitron pri "Fremdaj lingvoj kaj civilizacioj". La rezolucio same subtenas la Novan Ordon de Informado kaj Komunikado - kiun interalie iam atakis Usono farinte el ĝi pretekston por sia eksiĝo el Unesko. - Pluaj materialoj admonas nian membraron kontinuigi sian poresperantan laboron /pĝ.142-144/. Tre interesa por esperantistoj de ĉiuj aĝoj estas inaŭgura parolado de d-ro Max Yalden, ministro-komisiito de Kanado pri oficialaj lingvoj sub titolo "Senŝovinismigi komunikadon estas vivolaboro por multaj generacioj"/pĝ. 146-148/.

Plue mi rekomendas por via atento! 939 /3-1984/, pĝ. 43-44 "Forta parlamenta subteno en Britio"; pĝ. 45 - 46 "Anoncoj ĉe UEA fariĝas plikostaj"; 940 /4-1984/, pĝ. 64-66 "La instruado de E-o kiel kontribuo al internacia informado; 941 /5-'84/ pĝ.82 "Universitato de Londono enkondukos Esperanto-kurson".

942 /6-1984/, pĝ. 105 "Informado al eŭropaj parlamentanoj en Belgio"; pĝ. 107 "Argumentado pri Esperanto en brita televida teatraĵo"; pĝ. 115 "Festivalo en Moskvo" kaj "Pri neperforto en Rimini". 943-944 /7-8/1984/, pĝ. 121 "Simpozio en Ŝarajevo"; pĝ. 123 "Poezio kiel informilo"; pĝ. 125 "Janton pri internacieco de Esperanto"; pĝ. 126 "25 jaroj da praktika informado"; pĝ. 128-129 "Evoluiĝo de la zagreba instrumetodo"; pĝ. 132-133 "Pionira studo pri la Movado" - recenzo de la libro "The Esperanto-Movement" de Peter G. Foster; Nro 946 /10-1984/, pĝ. 163-164 "Utila forumo por la instruistoj" kaj pĝ. 165 "Aplika lingvistiko kaj internacia kompreniĝo".

## Jubileoj 1985

### 1/ GRAVAJ SOCIPOLITIKAJ JUBILEOJ

1985 INTERNACIA JARO DE LA JUNULARO /UNO/

08.05.1945 Tago de la venko super la faŝismo en Eŭropo /40 jaroj - subskribo de senkondiĉa kapitulacio de faŝisma Germanujo/

09.05.1945 LIBERIGO DE ĈEĤOSLOVAKIO FAR SOVETIA ARMEO /40 jaroj - liberigo de la ĉefurbo Prago/

06.08.1945 Japana urbo HIROŜIMA detruita per la usona atombombo /09.08.1945 - Nagasaki/ - Monda tago por malpermeso de la amasdetruiloj /40 j./

02.09.1945 Fino de la Dua Mondmilito /40 j. - subskribo de la kapitulacio de militisma Japanujo/

24.10.1945 TAGO DE UNUIĜINTAJ NACIOJ /40 j. - kompleta ratifiko de la Ĉarto de UNO; samjare en Londono - 16.11.1945 - estis fondita UNESCO/

28.10.1945 TAGO DE NACIIGO en ĈSSR /40 j. - granda industrio, bankoj kaj asekurejoj naciigitaj/

### 2/ ELEKTO DE LA JUBILEOJ DE UNESCO KAJ DE MONDA PACKONSILIO

04.01.1785 naskiĝis Jacob GRIMM, germana verkisto, fondinto de germana filologio /200 j./

23.02.1685 naskiĝis Georg Friedrich HÄNDEL, elstara germana komponisto /300 j.

21.03.1685 naskiĝis Johann Sebastian BACH, germana baroka komponisto /300 j./

23.03.1785 naskiĝis Ján HOLLÝ, slovaka verkisto /200 j./

31.03.1885 naskiĝis Václav Vilém ŠTECH, ĉeĥa arthistoriisto kaj kritikisto /100 j./

05.04.1835 naskiĝis Vítězslav HÁLEK, ĉeĥa poeto /150 j./

06.04. 885 forpasis METODO, bizantia scienculo kaj monaĥo, kunfondinto de la slava liturgio /1 100 j./

29.04.1885 naskiĝis Egon Erwin KISCH, praga germana skribanta verkisto, elstara ĵurnalisto /100 j./

22.05.1885 forpasis Victor Maria HUGO, franca verkisto kaj poeto /100 j./



07.06.1835 naskiĝis Adolf HEYDUK, ĉeĥa poeto /150 j./

29.07.1885 naskiĝis Emil Artur LONGEN, ĉeĥa aktoro, verkisto kaj pentristo /100 j./

24.08.1885 naskiĝis nacia artisto Václav ŠPÁLA, ĉeĥa pentristo /100 j./

19.09.1785 naskiĝis Václav PRACHNER, ĉeĥa klasicisma skulptisto /200 j./

17.10.1885 naskiĝis Niels BOHR, fama dana nuklea fizikisto, Nobelpremiito /100 j./

05.11.1885 naskiĝis Karel Hugo HILLAR, ĉeĥa dramverkisto, reĝisoro /100 j./

13.11.1885 naskiĝis nacia artisto Václav RABAS, ĉeĥa pentristo /100 j./

Kompleta listo de la jubileoj por dispono ĉe la komisionestro, eventuale ĉe Distriktaj /Urbaj/ Packonsilioj.

### 3/ JUBILEOJ DE LA MONDA KAJ ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-MOVADO:

07.-12.08.1905 I-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO en BOULOGNE-SUR-MER, Francujo /80 j./

1925 Lektorato de Esperanto fondita en Minista Altlernejo en Příbram /lektoro d-ro A. Šilha - 60 j./

1945 Centra Sindikata Konsilio /ÚRO/ de ĈSR enviciĝis Esperanton en la instruplanojn de la "Labor-lernejoj" /40 j./

05.06.1875 naskiĝis Stanislav Kostka NEUMANN, nacia artisto kaj elstara ĉeĥa poeto; kunfondinto de EK Prago /110 j./

06.08.1875 naskiĝis Josef ŘEBÍČEK, kunhelpanto de Moraviaj Esperanto-Pioniroj, verkisto kaj tradukanto en la fervojista fako /110 j./

14.04.1905 naskiĝis inĝ. Ladislav KRAJÍC, elstara instruisto de Esperanto, unua prezidanto de la Ekzamena Komisiono de ĈEA /80 j./

03.06.1905 naskiĝis Antonín SLANINA, rolinto de Silbernik, bopatro de Zamenhof en la dramsocieto Verda Ĉaro de Julio Baghy, resp. redaktoro de "Ligilo" kaj redaktoro de "Verda Voĉo de Dokay" /80 j./

10.07.1905 naskiĝis Vuk ECHTNER, elstara ĉeĥa Esperanto-pedagogo kaj pioniro de Esperanto inter blinduloj; redaktoro de "Aŭroro", internacia blindula gazeto /80 j./

28.07.1905 naskiĝis Vladimír LERAUS, elstara aktoro de Verda Stacio en Brno /80 j./

12.03.1915 naskiĝis Adolf STAŇURA, elstara tradukanto, lingva korektanto, estro de la lingva komisiono de ĈEA /70 j. /

06.02.1925 forpasis Karel Emanuel MACAN, blinda komponisto, fondinto de la Societo de Ĉs. Nevidantaj Esperantistoj SOĈNE /60 j./

05.02.1935 naskiĝis inĝ. Jan WERNER, esperantista faklingvisto /50 j./

15.02.1935 naskiĝis RNDr Vlastimil NOVOBILSKÝ, CSc., estro de la Scienc-Teknika Sekcio de ČEA /50 j./

## Ne forgesu...

1/...VIAJN ARTIKOLOJN, publikigitaj en kiu ajn ĉeĥa gazeto, ĵurnalo, n e p r e s e n d a d i s o l e al sekretariino de nia komisiono: Věra HERZOGOVÁ, Dlouhoňovice 113, 564 01 ŽAMBERK...

2/...MAGNETOFONAN PRUNTOSERVON por via dispono gvidas Josef FILIP, Nádraží ČSD 146, 768 11 CHROPYNĚ. Vi povas elekti el 18 titoloj /la listo havebla ĉe la gvidanto/...

3/...SENDADU historiajn kaj nuntempajn fotodokumentojn, fotokopiaĵojn pri via agado por la ekspozicio de ČEA preparata okaze de la Centjara Jubileo de Esperanto. La koncerna alvoko estis sendita al la lokaj grupoj, sekcioj kaj komisionoj de ČEA dum majo 1984. Viajn dokumentojn konstante akceptas: Jaroslav KLEMENT, Kpt. Nálepky 7, 360 04 KARLOVY VARY /telefono dum labortagoj Karlovy Vary 226 30/.

Jaroslav K l e m e n t,
komisionestro

# Má naše hnutí své zákonitosti ???

Při běžném pozorování našeho hnutí se může zdát, že myšlenka mezinárodní řeči se šíří příliš pomalu či dokonce stagnuje. Ohlédneme-li se však zpátky do minulosti, kdy před sto lety znal esperanto jen jeden jediný člověk, kdy jazyk sám měl malou slovní zásobu, primitivní mluvnici a velmi skrovnou literaturu, zatímco dnes najdeme esperantisty na všech kontinentech a slovníky a mluvnice svým rozsahem nahánějí strach a knihy se sotva vejdou do přecpaných knihoven, nelze pochybovat, že hnutí přece jenom postupuje kupředu, že se vyvíjí po stránce společenské i jazykové. Co však způsobuje tento pohyb a co ho brzdí? Vládnou i našim hnutím zákonitosti, jejichž poznání může naše snahy urychlit?

Na tyto otázky lze odpovědět jednoznačně kladně, protože mezinárodní jazyk jako společenský jev se nemůže vymanit z moci mechanismu, kterým je vytvářen pokrok lidstva. Tento mechanismus má vlastně existenci mezinárodního jazyka / mezinárodních jazyků / na svědomí, neboť narůstající mezinárodní spolupráce a záplava informací si vynutily nejen zvýšený zájem o studium cizích jazyků, ale také růst počtu internacionálních slov, která přímo provokují k vytvoření mezinárodní řeči. Samotné provokování však nedokáže nahradit potřebný společenský tlak, který jediný může myšlenku prosadit a který teprve pomalu, ale jistě vzniká. Ale protože každý jazyk musí projít dlouhodobým společenským vývojem a náročnými ověřovacími zkouškami, bylo nevyhnutelné a jedině správné, aby mezinárodní řeč spolu s dalšími prostředky /např. počítači/ se začala vyvíjet dávno před-



tím, než se tento tlak stane drtivým. V té době bude už lidstvo muset mít všechny možnosti řešení dokonale připraveny.

Stoupenci mezinárodních jazyků jsou velmi často motivováni spíše idealistickým nadšením než pocitem praktické potřeby, což jim brání vidět střízlivé, ale reálné cesty práce, a zabíhají raději do slepých uliček třpytivých vidin. Málokdy si například uvědomujeme význam ekonomiky v našem hnutí a odmítáme o ní uvažovat, abychom ušlechtilou ideu neposkvrnili tak přízemním tématem. A přesto právě ona je schopna postupně přeměnit myšlenku v realitu, kdežto bez ní můžeme o ideálech pouze hovořit a snít.

Všechny knihy, časopisy i akce jsou podloženy jednak obětavou prací, jednak finančními prostředky, bez nichž by samotná práce nebyla nic platná. Práci i peníze lze získat jen vysokou organizovaností uživatelů jazyka. Někdy nás mýlí skutečnost, že studující jiných jazyků po dokončení kursu se už organizovat nemusejí - zapomínáme, že potřebné organizace, finance, literaturu, turistiku a další formy jazykového života vytvářejí příslušníci daného národa v tak bohaté míře, že zahraniční studenti se mohou spokojit jen s přiživovací rolí. U mezinárodního jazyka je situace zcela jiná. My sami, kteří jsme se mu naučili jako cizí řeči, tvoříme jeho uživatele, jeho národ, proto my musíme zajistit všechno, co potřebuje, aby nám náš vklad mohl mnohonásobně vrátit. Nikdo jiný tento úkol za nás nevyplní, i kdyby chtěl, protože toho není schopen z toho jednoduchého důvodu, že jazyk neovládá.

Příliš by nepomohla ani ministerská rozhodnutí, která jsou bez naší práce bezmocná. Naštěstí na taková rozhodnutí čekat nemusíme, protože nám nikdo v naší práci nebrání. Pokud nevyužíváme svých možností, jsme si tím vinni sami.

Publikační možnosti každé organizace jsou závislé na počtu členů a výši členských příspěvků a na dalších zdrojích příjmů, k nimž patří i prodej již vydaných publikací. Každá kniha představuje dosti značnou částku, která se nedá dále použít, dokud se kniha nevyprodá, dokud trčí ve skladu. Dílo v cizím jazyce si spíše koupí ten, kdo jazyk ovládá, a většinou jen takový člověk má také zájem na členství v organizaci, na placení členských příspěvků, na využívání možností, které organizace nabízí osobám znalým jazyka. Tak dostáváme kruh vzájemných vztahů a závislostí mezi ekonomikou a jazykovou znalostí: ekonomika umožňuje publikovat, propagovat, vyučovat a organizovat, znalost zpětně stmeluje lidi, shromažďuje finanční prostředky, umožňuje využívat výsledky práce.

Šíření jazykové osvěty je velice důležité, a to stejnou měrou mezi neesperantisty i esperantisty. Je však třeba dávat pozor, abychom nenabízeli housle bez smyčce, abychom nepřesvědčovali k učení a zároveň nešířili názor, že na učení vlastně nezáleží. Abychom v lidech nepěstovali dojem, že mezinárodní jazyk je jako stroj fungující bez motoru a bez námahy, na který neplatí společenské ani psychologické zákonitosti, jehož snadnost spočívá v tom, že je možno při studiu bezmezně lajdačit, že lidstvu poslouží i v primitivní formě apod.

Dnešní svět se utápí v informační explozi, v záplavě kulturních, sportovních, politických, technických, vědeckých a jiných zpráv, bez kterých se žádný stát, žádné státní hospodářství neobejde. Za světové se považují ty jazyky, které nejlé-

pe tuto záplavu zvládají a předávají nejvíce informací. Množství předaných zpráv není závislé na počtu pasivních příjemců, nýbrž na množství osob schopných aktivně zprávy v daném jazyce formulovat a vysílat. Například jazyk INTERLINGUA vsadil na to, že díky původnímu pravopisu mezinárodních slov je na první pohled srozumitelný stamilionům lidí, kteří se ho nikdy neučili /srozumitelnější než esperanto/, jenže jeho nepravidelnost brání aktivnímu zvládnutí jazyka a tím využívání této výhody - napřed se totiž musí psát a pak je teprve možno číst. Snadnější esperanto publikuje daleko více, a má proto mnohem větší ohlas, i když také nestačí konkurovat světovým jazykům. U těch z každých deseti lidí, kteří se jazykem zabývají, umí vždy aspoň jeden perfektně mluvit a psát, protože příslušný jazyk je jeho mateřštinou. Národní jazyky mají prostě přirozený náskok, a s tím musíme počítat. U esperanta se přes jeho snadnost nepodařilo dosud dosáhnout srovnatelné účinnosti. Máme sice výborné znalce jazyka, ale jejich zastoupení je mnohem nižší než deset procent. Má-li být mezinárodní jazyk konkurenceschopný, musí dosáhnout účinnosti aspoň dvojnásobné.

Přes všechna očekávání nedosáhl zákon o výuce esperanta v MLR a BLR takových účinků, jak se předpokládalo, i když je to nesporně veliký úspěch a máme co závidět. Samotné příkazy nic nezmohou. Žádné město by například nešlo elektrifikovat pouhým dekretem či rozdáním žárovek. Musí se kopat, položit kabely, rozvrtat zdi v každém domě, postavit elektrárna. Jakmile je všem umožněno elektřinu užívat, využívají ji i bez dekretu. Zavést mezinárodní jazyk také neznamená jeho používání nařídit, nýbrž umožnit a zpřístupnit. Zpřístupnit všem nejen základy jazyka pro zábavu, nýbrž jazyk celý v plném rozsahu pro zpracovávání informační exploze, kvůli které lidstvo mezinárodní jazyk vlastně potřebuje. Až kterýkoliv člověk kdekoliv na světě bude mít možnost zvládnout kteroukoliv část jazyka, která ho zajímá /hovorová, umělecká, odborná podle různých profesí/, začnou se lidé o mezinárodní jazyk zajímat sami. Toto zpřístupnění můžeme provést pouze my, kteří se mezinárodním jazykem zabýváme. Pokud to ovšem budeme umět.

M. Malovec

Resumo: Temas pri leĝfenomenoj en E-movado kaj kiel ebligi kaj akirebligi studado de Esperanto en plena amplekso por prilaboro de informa eksplodo, pro kiu homaro la internacian lingvon antaŭ ĉio bezonas.

---

## KARL MARX KAJ FRIEDRICH ENGELS PRI LA "LANGUE UNIVERSELLE"

/ finigo /

Komplete la materialon verkis Dr. Detlev Blanke por la gazeto der Esperantist.

### 7. MARX KAJ ENGELS PRI LINGVO-PLANADO

Ĉio ĉi ĝis nun prezentita estas ja interesa sed ne influis la lingvosciencan koncepton pri la universala aŭ internacia lingvo, pri planlingvo. Tamen, almenaŭ por marksistaj lingvistoj unu citaĵo de Marx kaj Engels el ilia komuna verko "Die deutsche Ideologie" /La germana ideologio/ estas fundamente grava por ĝuste taksi la fenomenon de planlingvo. Ĝi fojfoje estas citata rilate al lingvoplanado. Oni diras, ke la tekstoparto estas de Marx. Mi ne trovis la pruvon por tio. Pro tio mi skribos pri "ili" do pri Marx kaj Engels. Ili skribas: "Die Naturwüchsigkeit der Sprache ist übrigens in jeder modernen ausgebildeten Sprache, teils durch die Geschichte der Sprachenentwicklung aus vorgefundenem Material, wie bei den romanischen und germanischen Sprachen, teils durch die Kreuzung und Mischung von Nationen, wie im Englischen, teils auf ökonomischer und politischer Konzentration bestehende Konzentration der Dialekte innerhalb einer Nation zur Nationalsprache aufgehoben. Dass die Individuen ihrezeit auch dies Produkt der Gattung vollständig unter ihre Kontrolle nehmen werden, versteht sich von selbst." /MESSU 237/

En tiu citaĵo aparte gravas la lasta frazo. Marx kaj Engels antaŭvidas, ke /1/ iutempe la homoj /2/ prenos sub sian kontrolon la lingvon, kaj tio estas por ili /3/ tute memkomprenebla. Do, la homo ne nur konscie kontrolas /kaj sekve sangas/ la materian kaj socian mondon sed ankaŭ sian instrumenton, la lingvon, kiu generale estis rigardita longtempe kiel ne ŝanĝebla dia kreaĵo. Pri la konscia influo de la homo je la evoluo de la lingvo ni jam abunde skribis aliloke 12/ kaj montris, ke kompreneble ekzistas multaj pruvoj por tio, ke la homoj konscie kontrolos /kaj ŝanĝos, se necese/ sian instrumenton - lingvon. Kiel do, la homo ankaŭ ne povus eĉ krei lingvon?

La citita teksto pro sia graveco estas plurfoje tradukita esperanten, bedaŭrinde ne ĉiam laŭ la germana originalo sed laŭ malsamaj fontoj. Tiel okazis, ke ekzistas gravaj diverĝoj inter la tradukoj, kiujn resumis LEVSEN 1983 13/ laŭ instigo de KEABLE. Ne detaligante la problemon sed atentigante pri la materialo en la GDR-PACO 1983, ni recitas nian tradukon el la jaro 1971 kun kelkaj korektoj kaj kun komento. Do la traduko:

"LA NATURA KRESKINTECO DE LINGVO CETERE ESTAS NULIGITA KAJ KONSERVITA EN ĈIU ALIA PLENEVOLUINTA LINGVO, PARTE PRO LA HISTORIO DE LA LINGVA EVOLUO EL EKZISTINTA MATERIALO KIEL ĈE LA ROMANAJ KAJ GERMANAJ LINGVOJ, PARTE PRO LA INTERKRUCIĜO KAJ INTERMIKSIĜO DE NACIOJ KIEL ĈE LA ANGLA; PARTE PRO KONCENTRIĜO DE LA DIALEKTOJ INTERNE DE NACIO AL NACIA LINGVO, BAZIĜANTA JE EKONOMIA KAJ POLITIKA KONCENTRIĜO. KE LA INDIVIDUOJ SIATEMPE PRENOS ANKAŬ TIUN PRODUKTON DE LA SPECIO SUB SIAN REGON, KOMPRENIĜAS EL SI MEM".

Tiu traduko povus esti mia respondo al la menciita alvoko de KEABLE kaj LEVSEN. La malfaciloj aparte kuŝas en la signifoj de du esprimoj: "aufgehoben" kaj "unter ihre Kontrolle nehmen".

a/ Marx kaj Engels verŝajne komprenas "aufheben", kiel ofte, ankaŭ ĉifoje en dialektika senco. Do oni devus traduki la esprimon samtempe per "nuligita" kaj "konservita".

b/ Kiel KEABLE ĝuste atentigas, "kontroli" en Esperanto ne enhavas la anglan kaj /ankaŭ/ germanan signifon de "regi" /kontroli bankon, entreprenon, akcian societon/. Per aparta rimarko PIV /561/ atentigas "kontroli neniam havas la anglan sencon "regi, direkti". Sciante, ke la esenca trajto de la instruo de Marx kaj Engels estas AKTIVE ŜANĜI la sociajn kondiĉojn, oni

povas tamen supozi, ke ankaŭ rilate la lingvon ili komprenis "kontroli" en tiu aktiva senco. Por stimuli diskuton pri tiu grava problemo mi ankaŭ citas la aliajn tradukojn kaj la komparon: En sia "Historio de la Mondolingvo" /Leipzig 1931,p. 7/ DREZEN tradukis: "En ĉiu nuntempa alt-evoluinta lingvo la pratempe elemente naskiĝinta parolo leviĝas al la nivelo de nacia lingvo. Parte dank' al historio de la lingvoevoluo - el la jam preta materialo, kiel ni ĝin observas ĉe la romanaj kaj germanaj popoloj, parte dank' al intermiksiĝo de la popoloj, kiel ĉe la angla lingvo, parte dank' al koncentriĝo de dialektoj ĉe iu popolo, kio eventas sur bazo de ekonomia kaj politika koncentriĝo. Estas memkompreneble, ke la individuoj siatempe kapablos plengrade kontroli tiun ĉi produktaĵon de la homgenro".

Eble li eliris de la rusa traduko. Alia traduko estas de SKUPAS /"Horizonto de Soveta Litovio", 2/1971, p.7, en la artikolo "Lingvistikaj konceptoj de F. Engels/:

"Natura lingva kreskado, cetere en ĉiu moderna evoluinta lingvo, leviĝis al nacia lingvo parte per historia evoluo de lingvo el antaŭe trovita materialo, kiel tio okazis ĉe romanaj kaj germanaj lingvoj; parte per kruciĝo kaj miksiĝo de nacioj, kiel ĉe la angla; parte per koncentriĝo de dialektoj interne de unu nacio surbaze de ekonomia kaj politika koncentriĝo. Ke la individuoj siatempe ankaŭ tiun ĉi faritaĵon de la homa gento prenos sub sia absoluta kontrolo, estas memkompreneble."

SKUPAS estas Litovo. Laŭ kiu traduko li esperantigis?

## 8. KONKLUDE

Marx kaj Engels ne aparte aŭ sisteme okupiĝis pri la lingva komunikada problemo nek pri la universala lingvo. Ili estis poliglotoj kaj kapablis transsalti la lingvajn barojn. Tamen iliaj eldiroj pri lingvaj demandoj estas valoraj por la ĝenerala interlingvistika problemaro.

La periferiaj mencioj de la universala lingvo ne ebligas konkludi pri negativa aŭ pozitiva sinteno al la problemo. Ĝi simple por ambaŭ ankoraŭ ne estis aparte grava kaj priparolinda problemo. Aliflanke forestas iu ajn negativa nuanco. Plej gravas, apliki la teorion de la marksismo-leninismo je la problemo de internacia lingva komunikado ĝenerale - kun ĉiuj aspektoj - kaj je la planlingvoj aparte.

NOTOJ

12/ BLANKE, D. /1981/: Pri la problemo de laŭplana influado je la lingvoevoluo fare de la homo. En: GDR-eldono de "PACO", Berlin 1981, p. 24 - 31.
La studo aperis en pola traduko en EJSMONT, T. /1982,Red./: Problemy miedzynarodowej komunikacji jezykowej. Problemoj de internacia lingva komunikado. Materialy konferencyjne. Lodz /Uniwersytet Lodzki/ 1982, p. 180 - 207.

13/ LEVSEN, P. /1983/: Grava teksto de Karl Marx en diversaj tradukoj. En: GDR-eldono de "PACO", Berlin, 1983, p. 20 - 21.



# L A L O K O D E I D I O T I S M O J E N E S P E R A N T O

/ Bernard G o l d e n /

En PLENA ILUSTRITA VORTARO /PIV/ "idiotismo" estas difinita jene: "nelogika aparta vortkonstruo, propra al iu lingvo sed ne al aliaj". En nova Esperanto-lernolibro por angleparolantoj /ESPERANTO - THE INTERNATIONAL LANGUAGE de W.J.Downes/, la aŭtoro asertas, ke Esperanto ne havas idiotismojn /pĝ. 7/ kaj ankaŭ, ke idiotismoj havas neniun lokon en Esperanto /pĝ. 104/.

Ne nur mi, sed ankaŭ d-ro ZAMENHOF malsamopinias kun s-ro DOWNES rilate la rolon de idiotismoj en Esperanto. Kelkaj citaĵoj el verkoj de la aŭtoro de Esperanto montros sen ombro da dubo lian sintenon pri tiu ĉi demando. En letero sendita al Louis COUTURAT en 1905 ZAMENHOF skribis la sekvajn vortojn:

"Mi esperas, ke iom post iom ĉiuj idiotismoj malaperos kaj cedos sian lokon al esprimoj tute logikaj kaj internaciaj. Tamen laŭ mia opinio ni devas fari tian anstataŭigadon nur en tia okazo, se ni povas tion ĉi fari tute OPORTUNE; sed en okazo, se ni por ia idiotismo NE trovos pli bonan esprimon pure logikan, tio ĉi ne devas nin ĉagreni, kaj la idiotismo povas tute oportune resti kiel "esperantismo", se ĝi nur estos komune AKCEPTITA."

Du LINGVAJ RESPONDOJ ripetas la larĝan vidpunkton de ZAMENHOF pri idiotismo kadre de la demando pri la Esperanta stilo. En 1906 li skribis jene:

"Ankaŭ en Esperanto troviĝas diversaj /ne multaj/ idiotismoj, kaj tute malprave kelkaj Esperantistoj ili kontraŭbatalas, ĉar lingvo ABSOLUTE logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo senviva kaj tro peza; sed kvankam kelkaj el la Esperantaj idiotismoj estas prenitaj ANKAŬ el la lingvoj slavaj /dum aliaj estas prenitaj el aliaj lingvoj/, ili tamen estas ne slavismoj, sed ESPERANTISMOJ, ĉar ili fariĝis PARTO DE LA LINGVO. /LINGVA RESPONDO 149, 6-a eldono,1982/

En LINGVA DEMANDO publikigita la sekvan jaron, ZAMENHOF komentis pri la problemo traduki idiotismojn el aliaj lingvoj en Esperanto:

"Naciajn idiotismojn, kiuj ne prezentas necesaĵon, ni devas kompreneble eviti kaj ni devas peni traduki ilian sencon en maniero plej logika kaj internacia; sed tiajn esprimojn,kiujn ĉiu lingvo nepre DEVAS posedi, ni devas peni en tiu aŭ alia maniero nepre TRADUKI, sed ne simple EVITI ilin, pro timo, ke nia esprimo eble ne plaĉos al la legantoj aŭ ne ĉiuj ĝin tuj bone komprenos... ...ni devas memori, ke nia lingvo devas servi ne sole por dokumentoj kaj kontraktoj, sed ankaŭ por la VIVO; tial ofte /precipe en vivaj dramaj dialogoj/ pli bona estas frazo ne tute logika kaj ne perfekte preciza, sed mallonga kaj viva, ol frazo perfekte preciza, sed enuige peza kaj tro kabineta. /LINGVA RESPONDO 150, 6-a eldono, 1962/

Ni aŭskultu ankoraŭ unu voĉon pri tiu ĉi temo. En apendico de sia romano LA LITOMIŠLA TOMBEJO, Karolo PIĈ prezentas plurajn pensinstigajn ideojn pri lingvo kaj stilo en eseo titolita "La romano kaj ĝiaj lingvaj problemoj". PIĈ pledas por pli viva kaj riĉa lingvo kaj pli fleksebla stilo. Tri frazoj estas citindaj:

"La Esperanta romano urĝe bezonas koncizan kaj elastan konversacian stilon, tiun stilon, kiu regas en normalaj interparoloj kaj hejmaj babiloj, kaj tiu diametre diferencas ab la mucida lingvaĵo, kiu ŝimas en lernolibroj." /pĝ. 247/

"La parola lingvo estas kurioza miksaĵo de skrupula precizemo kaj de facilanima, senzorga, iam preskaŭ fola leĝero." /pĝ. 248/

" Ĉar la beletra romana sublingvo prezentas nur ĉiel privatan pure individuan parolmanieron de ĉiel privataj kaj individuaj romanaj roluloj, kiuj povas erari kaj kiuj fakte eĉ eraras, ne esprimante sin ĉiam tute ĝuste kaj korekte. Sed jen kaj jen ili, forsin, uzas eĉ parolturnojn kaj terminojn, kiujn la legantojn trovos imitindaj kaj utilaj." /pĝ. 250/

Ĉu tie ĉi ne aŭdiĝas eĥoj de la zamenhofa vortoj de antaŭ pli ol sep jardekoj: "pli bona estas frazo ne tute logika kaj perfekte preciza, sed mallonga kaj viva"? Ĉio ĉi rilatas rekte al la lernolibro de s-ro DOWNES. En la ekzercoj troviĝas ĝuste tiu "mucida lingvaĵo", kiun PIČ malestimas, ĝuste tiaj enuige pezaj kunmetaĵoj de vortoj, kiujn ankaŭ ZAMENHOF kondamnis. Miopinie lernantoj pli rapide lernus la Internacian Lingvon, se en lernolibro, anstataŭ serioj da frazoj por de- kaj altraduko, estus interesaj legaĵoj verkitaj en viva lingvaĵo kaj eble spicitaj ie kaj tie per kelkaj verdaj idiotismoj aŭ esperantismoj. Kaj la plej bonaj legaĵoj por elementa lernilo certe estas tiuj en la formo de dialogoj aŭ konversacioj.

el fervojista movado

## EL FERVOJISTA MONDO

### MOSKVO SOLVAS PROBLEMOJN DE LA FERVOJA TRANSPORTO

La moskva fervojnodo apartenas sendube al tiuj plej grandaj trafiknodoj. Naŭ ĝisnunaj fervojstacioj jam ne sufiĉas por plenumi bezonojn de la rapide kreskanta urbego kaj kreskanta nombro de la vojaĝantoj, ĉiutage alveturantaj en la sovetan ĉefurbon. Tial oni decidis konstrui la dekan fervojstacion.

La sama situacio estas sentebla ankaŭ sur linioj ĉirkaŭ la ĉefurbo kaj sur ĉeflinioj. Kiel plu altiĝi kapaciton de jam nun maksimume streĉita trafikuzo de la ĉefaj linioj?

Unu el la solvoj estos formado de persontrajnoj konsistantaj el 24 ĝis 36 vagonoj. Ĝi estos iuspeca analogie de la"dekmiltunaj" vartrajnoj, kiuj samtempe transportos pli multe da varoj.

Sed tiom longaj trajnoj estus nepraktikaj por pasaĝeroj dum serĉado de la bezonata vagono sur perono. Tial ĉiuj grandaj moskvaj fervojstacioj ankaŭ estonte forlasos maksimume dekkvinvagonajn unuojn, kiuj poste estos kunjungataj en moskvaj antaŭurboj por fari trajnojn kun 24 aŭ 36 vagonoj.

Ekzemple jam nuntempe forveturas el la moskva leningrada stacio multaj trajnoj en kvinminutaj periodoj, poste kunjungotaj kaj antaŭ finstacio en Leningrad estas tiuj longaj trajnoj denove dividataj.

Unu el modernaj aranĝaĵoj sur rando de Moskvo, kie oni kunjungas la trajnojn, estos nova jam la deka moskva fervojstacio konstruota en sudokcidenta parto de la urbo, en kvartalo Bitci-Kalinino. La komplekso estos kompletigota per hotelo, granda magazeno kun subteraj garaĝoj kaj parkejoj. La urba trafiko, precipe tiu aŭtobusa, havos siajn haltejojn en unu el etaĝoj sub la terminalo, en teretaĝo de la fervojstaciaj haloj. Du placoj antaŭ la stacidomo estos kunligataj per subteraj tuneloj por motorveturiloj kaj por piedirantoj. Oni nuntempe jam finas projektajn laborojn kaj dum unu jaro oni komencos la konstrulaborojn.

J. Tomíšek

### ANTAŬ EKVETURO DE LA UNUAJ LOKOMOTIVOJ

Ekveturon de trajnoj sur tiu ĉi linio anoncas neniu horaro. Ĝi ne estas bezonata, car oni tie transportas nek pasaĝerojn nek ŝarĝojn. Tasko de la fervoja provlinio en CERHENICE APUD VELIM, kiel diras jam ĝia nomo, estas tute alia. Oni temas pri la sola provlinio de tiu speco en Eŭropo. Ĝi longas proksimume 13 kilometrojn kaj lokomotivoj tie atingas rapidecon ĝis 200 km en horo. Lastjare aŭtune tiu ĉi laborejo de Fervojesplora Instituto Prago festis jam dudekan datrevenon de sia ekzisto . Dum tiu tempo oni tie provekzamenis kelkcent lokomotivojn kaj tirvagonojn, person- kaj ŝarĝvagonojn kiel ankaŭ aliajn specojn de la fervoja tekniko.

Ĝuste en Cerhenice oni unuafoje praktike provekzamenas ĉiujn novajn lokomotivojn el nacia entrepreno ŠKODA, fabrikejo Elektrolokomotivoj. Oni provekzamenas ĉi tie ankaŭ teknikajn kondiĉojn kaj trakcian kapablon de fabrikaĵoj el entrepreno Lokomotivejo ČKD Prago, eksplikas inĝ. Jiří ŠEDIVÝ el esplora kaj evolua parto de trakcia ekonomio de Fervojesplora Instituto. "Dum tiom densa trafiko sur niaj fervojlinioj, provekzamenoj de la nova fervoja tekniko daŭrus pli longan tempon,nekonsiderante la fakton, ke ili senbezone malfruigus veturon de aliaj trajnoj. Krome sur linioj de fervojreto ČSD oni eblas trafiki maksimume per rapideco 120 km en horo kaj tio estas nesufiĉa por niaj postuloj".

La pretendemaj kriterioj, kiujn lokomotivestroj devas pruvi sur fervoja provlinio, signifas antaŭ ĉio rapidecon kaj trakciajn pruvekzamenojn, do dependecon de tirpovo je rapideco.Tial oni post ĉiu nova tirvagono aŭ lokomotivo - tiuj trakcias je maksimuma povumo - kroĉas bremsparton, kiu konsistas el elektra lokomotivo kaj veturrezista vagono. Pezo de la bremsparto atingas 210 tunojn. Kaj tio estas jam komparebla kun pezo de rapidtrajno. Per regulado de la efiko ĉe bremsparto oni aldone eblas imiti ankaŭ ciujn cirkonstancojn sur la fervojlinio. Veturon laŭ deklivo supren aŭ malsupren, lacigon kaj vivkapablon de la reloj, unuvorte provekzamenojn, pere de kiuj

oni atestas fidindecon kaj kvaliton de la novaj fabrikaĵoj.
Netakseblaj estas eblecoj de la fervoja provlinio por plirapidigi evoluon de la prototipoj, ĉar se ĉi tie oni por esploro de iliaj ebloj dum la uzado bezonas kelkajn monatojn, dum normala fervojtrafiko oni bezonus kelkajn jarojn. Ekzemple oni ĉi tie esploris dupartan motorlokomotivon ČS-8, kiu trakcios sur sovetuniaj fervojlinioj inter Moskvo kaj Leningrad.En Cerhenice ĝi atingadis rapidecon 200 km en horo, ĝia meznivela rapideco kun dudek pasaĝervagonoj tamen estos duona. Unuajndekojn da kilometroj sur tiu ĉi fervoja provlinio plenumis ankaŭ la plej nova prototipo el vagonfabriko Studénka, la rapidtrajna motorvagono AČ-2 destinita por Sovetunio.

J. Tomíšek

HURIKANO KONTRAŬ FERVOJO

La antaŭmallongtempa hurikano Alleta kaŭzis al nikaragva fervojo kun ŝpuro 1067 mm kaj interliganta la pacifikan havenon Corinto tra urbo León kun ĉefurbo Managvo kaj urbo Granada tiomajn difektojn, ke oni decidis rekonstrui tiun ĉi fervojlinion por normala ŝpuro 1435 mm. Por rekonstrui la parton Corinto - Managvo oni bezonos tempon tri ĝis kvar jarojn.En plua periodo oni planas plukonstrui la linion tra urbo Santo Tomas al marhaveno El Bluff sur la atlantika marbordo de la lando. Por plenumi tiun ĉi taskon oni bezonos pluajn kvar ĝis ses jarojn. Oni projektas ankaŭ elektrizi tiun ĉi estonte tre signifan fervojon kunligonta oceanojn, kio malaltigos kostojn por importo kaj eksporto de la bezonataj produktoj kaj varoj. La marŝipoj, navigantaj tra Atlantika oceano al pacifikaj marhavenoj en Nikaragvo devas nun uzadi la Panaman Kanalon. Pro tio pligrandiĝas la kostoj kaj por transporto oni bezonas konsiderante pli longan tempon.

GRANDAJ RAPIDECOJ EN AŬSTRIO

Aŭstriaj fervojoj viciĝas inter tiujn en Eŭropo, kiuj enkondukas sur siaj linioj rapidecojn ĝis 250 km en horo.Nuntempe oni preparas por menciita rapideco 53 km longan parton de la linio en regiono Hadersdorf inkluzive de 13 km longa tunelo. Dum la nuntempa veturtempo de rapidtrajno el Vieno al 317 km malproksima Salzburg estas 3 horojn 15 minutojn ĝis 4 horojn, estonte ĝi daŭros unu horon kvardekkvin minutojn. Plue oni decidis rektifiki dekdu aliajn liniopartojn kaj konstrui tunelon sur la konata Semmering, kio ebligos mallongigi veturtempon sur linio Vieno - Graz de nuntempaj 2 horoj 30 minutoj al 1 horo 15 minutoj. Por plenumi la menciitajn aranĝaĵojn oni bezonos 27 miliardojn da aŭstraj ŝilingoj.

SUBTERA FERVOJO EN VARSOVIO

Post fino de studoj kaj planlaboroj oni en Varsovio komencis en 1983 konstrulaborojn de la subtera fervojo kun helpo de sovetaj specialistoj. Helpe de Sovetunio celas planlaborojn,konstruon de la linioj kaj liveron de la surrelaj veturiloj, eventuale aliajn ekipaĵojn. La unua linio de la varsovia metroo estos 23 km longa kaj kondukos el suda parto de Varsovio norden, al tiea ŝtala kombinato. Laŭplane oni en 1990 finos konstrulaborojn de la unua parto 12 km longa, kiu finas en metroostacio Wawelska. Ĝis la jaro 1992 oni planas finkonstrui la duan etapon, dum kiu metroo atingos la fervojan stacion PKP Gdanska, la restanta parto estos finkonstruota en jaro 1994. En centro de la urbo estos tuneloj 17 metrojn sub la ternivelo.

Kompilis J. Tomíšek

MONTPASEJO INTER NORDO KAJ SUDO

"Montpaseja" kunligo inter sudo kaj nordo de Eŭropo estas la brennera fervojo, konstruita antaŭ cent jaroj. Jam pli ol dek jarojn prikonsideras fervojeksportoj en Aŭstrio,Italio kaj Federacia Respubliko Germanio ĝian modernizon. Totala kargotransporto de tiu ĉi fervojlinio estas eluzata jene: 88% apartenas al fervojkunligo FRG kaj Italio, 3% al kunligo GDR - Apenina duoninsulo kaj la restantaj 9% estas uzataj de la ceteraj eŭropaj landoj, precipe tiuj nordeŭropaj. Nuntempe ascendas la trajnoj el aŭstria Innsbruck 700 metrojn alten al la Brennera Montpasejo kaj poste descendas pli ol mil metrojn al itala Bolzano.

Multaj kurbigoj malaltigas rapidecon al meznivelaj 67 km en horo; pojare oni transportas tie ĉi preskaŭ 2,5 milionojn da pasaĝeroj. Estonton de la ĉi tiea transporto destinas rapidvojo por rapideco 200 km en horo, kiu sube de Brenner kun kiel eble plej malalta altecdiferenco inter rivervalo de Inn, la plej supra punkto de fervojlinio kaj malaltaĵo de la itala Adige trairos tra montara baro inter Aŭstrio kaj Italio. La planitaj studoj supozas 60 km longan valan tunelon kun norda portalo senpere apud Innsbruck, kiun la trajnoj forlasos nelonge antaŭ Brixen. La fina solvo de la problemo estas decidota en estontaj jaroj aŭ monatoj; oni pripensas ankaŭ eblecon konstrui la supran, 24 km longan tunelon aŭ kompromisan proponon konstrui investe ne tiom postuleman kvardekkilometran valan tunelon aŭ du malpli longajn tunelojn, anstataŭontaj la sesdekkilometran, probable la plej oportunan alternativon.

LA SUBTERAJ POŜTTRAJNOJ

Dutraka, 10,5 km longa linio kun ŝpuro 610 mm, situanta en tunelo kun diametro 2,75 m, estas uzata en Londono por transporto da poŝtaĵoj inter la paddingtona stacio kaj Whitechapel. Sume 34 novaj aŭtomataj veturilaroj anstataŭis tiujn malnovajn, uzataj jam kvindek jarojn; liveris ilin la firmao Greenbat, apartenanta al konzerno Huuslet. Ĉiu trajno estas 8,23 metrojn longa kaj transportas kvar kontenerojn kun po 15 poŝtaj sakoj kun leteroj aŭ ses poŝtsakoj kun pakaĵoj.

La trafikdenseco estas 12 trajnoj en horo ĉiudirekte, dum streĉa tempoperiodo ili eblas trafiki unu post la alia en tempoperiodo de kvar minutoj. La trajno konsistas el du pelvagonetoj enhavantaj trakcian motoron kun povo 16 kW, inter ili estas kontenervagono kun poŝtaj sendaĵoj. La kontinuan kurenton liveras la tria relo, kiu en interstaciaj partoj kun elektra tensio 440 V permesas rapidecon 56 km en horo, en stacioj kun elektra tensio 150 V permesas maksimuman rapidecon 11 km en horo.

En jaroj 1984 kaj 1985 festas Fervojista sekcio kaj tutmonda fervojistaro kelkajn gravajn jubileojn.

La tutmonda estas 75 jaroj de Internacia Fervojista Esperanto Federacio. Laŭ la jubileo oni vidas, ke fervojistoj apartenas al pioniroj de Esperanto movado en la mondo. Dum 75 jaroj faris fervojistoj multon ne nur por teĥnika evoluo de fervojoj sed ankaŭ por propagando de Esperanto por fervojaj celoj.

Ankaŭ en nia lando ni festas kelkajn jubileojn:

60 jaroj pasas ekde la dato en kiu estis en "urbo de fervojistoj" /Česká Třebová/ fondita Esperanto klubo, kiu estiĝis tutlanda fervojista sekcio.

Venontjare, la 13.1.1985 pasos 20 jaroj de fervojista movado. Tiam, antaŭ dudek jaroj fondis Bohumil KRÁL en sindikata rondo de Trafikministerio grupon de fervojistoj. En la jaro 1969, do antaŭ 15 jaroj, kiam estis fondita Ĉeĥa Esperanto-Asocio, tiu ĉi grupo estiĝis sekcio de asocio.

Dudek jaroj estis plenaj ne nur de sukceso, sed bedaŭrinde ankaŭ malĝojo kaj zorgoj. Sekcio havas simpatiantojn ne nur hejme, sed ankaŭ eksterlande. Al ĝojo apartenas fondiĝo de Fervojista sekcio de Slovaka Esperanto Asocio. Ni plene esperas ke slovakaj fervojistoj bone eklaboros kaj mi povas diri,ke ni estas ĉiam pretaj helpi al ili. Por venontjara laborplano ni havas ne nur niajn kutimajn aranĝojn, sed inter ili ni enviciĝos aranĝojn de FS SEA.

Dum dudek jaroj ŝanĝiĝis ankaŭ membraro de sekcio. Kelkaj foriris, eble ili ne trovis tion, kion ili serĉis. Venis novaj, ankaŭ ne fervojistoj laŭ okupo, kiu enviciĝis ne nur kiel simplaj membroj, sed kiel helpantoj de estraro. Kelkaj el vi memoras enketon, kiu faris tiama estraro de sekcio antaŭ dek jaroj. Jes, ne miru. Ni laboras kun nomaro de membroj, kiu el duono ne plu validas. Estas tie nomoj de membroj, kiuj nin forlasis poreterne, kelkaj forlasis nian movadon pro diversaj kaŭzoj. Al aliaj ni skribas invitilojn, sed bedaŭrinde sen ia respondo. Estas membroj de asocio kaj sekcio kiuj plendas, ke ili lernis Esperanton, kaj nek asocio nek sekcioj faras por ili ion, kie ili aplikus Esperanton. Mi povas diri, ke ĉe ni tio estas male. Estraranoj de sekcio donacas al movado multon el sia libera tempo, sed vane. Preskaŭ ĉiun duan monaton okazas ne nur hejme, sed ankaŭ eksterlande ia aranĝo, kien ni ĉiam elkore invitas nian membraron. Sed bedaŭrinde partoprenas nur kelkaj.Kiel ekzemplon mi povas montri ĉijaran IFEF-kongreson.El 14 partoprenantoj de ĈEA estis nur 6 /vorte ses!/ membroj de sekcio. La aliaj estis membroj de diversaj lokaj grupoj. Ĉi jare en Jablonec nad Nisou okazis konferenco de sekcio. Ĝin partoprenis nur sep niaj membroj krom eksterlandanoj. Mi scias,ke fervojistoj estas sufiĉe labore okupitaj. Tamen mi pensas, ke el 70 membroj, kiuj laŭ malnova nomaro sekcio havas, tio estas tro malmulte. Mi ĉiam estas kontraŭ granda nombro de membroj, kies nomoj estas nur sur papero. Se ni havos trionon, sed aktivaj membroj, tiel estos por ni pli bone.

Kion kaj kiel plu? Mi volus peti vin ĉiujn, kiuj volas plue aktive, kaj ankaŭ laŭ viaj eblecoj, esti membroj de fervojista sekcio, prenu paperon kaj skribu al ni viajn opiniojn. Se tamen vi havas nenion al ni diri kaj volas resti inter ni, sufiĉas skribi al ni nur tion, ke vi volas resti membroj de sekcio. En STARTO estis jam menciite, ke ĈEA aplikas novan komputilan metodon en statistikaj laboroj. Por ni asocio obligos laŭ viaj respondoj fari novan nomaron de membroj de Fervojista sekcio.

Jar. Kašparec

## 37. kongres IFEF ve VEJLE

Příští kongres železničářů se bude konat ve dnech 17.-23.5. 1985 v dánském městě VEJLE. Účast na kongresu si musí každý zájemce hradit ze svého devizového příslibu. Protože jeden z výletů směřuje i do NSR, je třeba při vyřizování vízových formalit počítat i s tímto státem.


Jaké jsou ceny kongresu?

| | |
|---|---|
| Kongresový poplatek pro člena sekce | 300 dkr |
| Kongresový poplatek pro rodinného příslušníka | 150 dkr |
| Hotelové ceny | od 150 dkr do 300 dkr |
| Výlety: polodenní do Legolandu | 60 dkr |
| celodenní výlet jižním Dánskem do NSR a lodí zpět /třeba vízum!/ | 150 dkr |
| polodenní do RIBE | 40 dkr |

Zájemce, který dostane od státní banky ve svém bydlišti potvrzení devizového příslibu, nechť si napíše na naši adresu. Sekce železničářů ČES udělala dohodu s dánskou železničářskou sekcí, že naši členové mohou platit na místě poplatky, které jinak bylo třeba zaplatit do 31.1.1985.

Jar. Kašparec

## Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA



Post la 3-a seminario de STS ĈEA, AEST ´84 en BRNO, oni povas jam paroli pri serio da seminarioj, kiujn aranĝas nia sekcio: 1980-Ekologio, 1982 - Energio, 1984 - Nutraĵoj. Tiuj ĉi larĝaj temoj estis elektataj por ebligi al fakuloj de preskaŭ ĉiuj branĉoj partopreni en la seminarioj kaj kontribui al la starigitaj temoj. Ne ĉiam tiu eblecco estis utiligita.

Ŝajnas, ke konvena temo de la sekva seminario devus esti "AKVO". Akvo kiel necesaĵo de la homa vivo, kiel fonto de energio, kiel konsistaĵo de ĉio viva.

La pritraktindaj problemoj estas precipe du:

a/ per multflanka homa agado en la industrio, agrokulturo, transporto kaj privata aktivado de la loĝantaro la akvo grave malpuriĝas kaj perdas sian uzeblecon,

b/ en pluraj regionoj manko de precipitaĵoj malfavore influas la produktaden de nutraĵoj.

Estus inde okazigi tiuteman seminarion, sed ...

La seminarioj, resp. konferencoj AEST okazas en ĉeĥaj landoj en paraj jaroj, en Slovakio en la neparaj. La sekva ĉeĥa seminario estus okazonta

en 1986. Sed por tiu jaro estas preparata la internacia konferenco INTERKOMPUTO en ŽILINA, kune kun la slovaka konferenco AEST, origine planita por 1985. La decido pri INTERKOMPUTO kaj transŝovo de AEST '85 al la jaro 1986 estis farita en la tempo de intensaj preparoj de AEST '84 en BRNO, kaj oni ne povis pritrakti kaj enplanigi la "ĉeĥan" AEST por 1985. Tial la AEST '85 ne okazos kaj montriĝas, ke la proksima konvena jaro estos 1988 / ĉar en 1987 estos la jubilea Universala kongreso en VARSOVIO, kaj en nia lando pluraj solenaĵoj de la 100-jariĝo de Esperanto.

x x x

Inĝ. Maria TAŜEVA / bl.620, vh.B,ap.54, BG-1336 SOFIA/ sendis al ni alvokon al ĉiuj fakuloj en ĥemio kaj nutraĵ-industrio /bioĥemio, teĥnologio de laktaĵoj, viandaĵoj, trinkaĵoj, vegetaloleo, eteroleo, pastaĵoj, cerealkonservado, tabako, aparatoj kaj maŝinoj, ekipaĵo k.s./. Formiĝas aparta sekcio de tiuj fakuloj kadre de ISAE.

Ĉi tiu alvoko instigas nin atentigi ĉiujn, ke estus inde ke niaj seminarioj ne restu unufojaj aranĝaĵoj aŭ kampanjoj, sed ke iliaj temoj fariĝu daŭraj taskoj de specialaj laborgrupoj /aŭ naciaj aŭ internaciaj/. Ni rekomendas, ke interesiĝantoj skribu al inĝ.TAŜEVA.

x x x

En Sovet-Unio, en la Scienco-Teĥnika Komisiono de ASE fondiĝis Sekcio pri ter-sciencoj /geologio, minaĵoj, meteorologio, ekologio k.s./.Sekretario de la sekcio estas: Viktor KISELJOV, ul.Razina 5 - 1, SU - 734005 DUŜANBE.

x x x

Tutmonda Unio por Vivprotektado /Pf. 6, A-5033 SALZBURG/, internacia organizaĵo por la protektado de la naturo, pejzaĝo, animala kaj homa vivo, uzas ankaŭ Esperanton.




## SOMERE EN BULGARIO

En STARTO 2/1984 sur paĝo 15 mi legis en "TURISMA MONDO" pri okazonta INTERNACIA SOMERA ESPERANTO UNIVERSITATO /ISEU/ en VELIKO TÂRNOVO - Bulgario.

Ni /mi kun mia edzo/ decidis partopreni ĝin por ĝui internacian medion, paroli kun eksterlandanoj, akiri novajn amikojn kaj ekkoni pli profunde la landon, kiun tiom multe da ĉeĥoj ĉiujare vizitas.


Bedaŭrinde malgraŭ la anonco en STARTO, ni estis unuunuraj ĉeĥoj partoprenantaj ĉi tiun tre interesan kaj por estonte certe rekomendindan aranĝon. Inter ĉirkaŭ cent ĉeestantoj, kompreneble plejparte bulgaroj, estis kelkaj gastoj el Hungario, Greklando kaj Finnlando. Kvankam en la ĉefa programo - antaŭtagmezaj prelegoj - okazis kelkaj ŝanĝoj, la ĝenerala nivelo estis tre bona /eĉ elstara en kelkaj kazoj/ kaj la temoj sufiĉe variaj kaj interesaj. El inter la prelegintoj mi nomu almenaŭ kelkajn: d-ro Stojan ĜUĜEV - du prelegoj pri interlingvistiko, Belka BELEVA /anino de BET/ - pri retoriko kaj "Kiel prelegi elokvente", d-rino Maria PONTIKA el Greklando - pri la greka familio kaj seminario pri la nuntempa greka virino, Rados PÉTER el Hungario - pri nova pirata instrumetodo t. e. kurso de "fiŝoj", Kiril DRAJEV - pri evoluo de skribomaniero, kaj pri siaj travivaĵoj dum aventuroplena vojaĝo sur la ondoj de Atlantiko, V. OLJANOV - pri land- kaj personnomoj en Esperanto, prof. Kiril POPOV - pri kancero kaj pri homa sano kaj socio ktp.

Kompreneble okazis interkona kaj adiaŭa vesperoj, estis prezentitaj kelkaj filmoj, la ĉeestantoj mem aranĝis koncerton "de ni por ni" kun popolkantoj, recitado ktp., plurfoje okazis diskoteko.

Tre interesaj estis ekskursoj - unu tuttaga al urbo GABROVO kun nova planedario, muzeo de humuro kaj skanzeno ETÂR /ni ĉi tage vizitis ankoraŭ la vilaĝon BOĴENCI kaj grotojn ĉe DRJANOVO/ kaj du duontagaj ekskursoj, kie ni trarigardis la urbon VELIKO TÂRNOVO kaj la najbaran vilaĝon ARBANASI kun tipa arĥitekturo - domoj "fortikaĵoj".

Fine mi volas diri, ke nian kontentecon kunkreis kaj multe pligrandigis tre amikeca etoso, gastamo kaj afabla sintenado de la bulgaraj samideanoj. Ni gajnis tie kelkajn tre bonajn amikojn.

M. Jelínková



## el junulara vivo

**tejo**

tutmonda esperantista junulara organizo

## PRI LA 40-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO EN SWANWICK

La 40-a IJK okazis en Britio en la urbeto SWANWICK, ĉe la konferenc-centro HAYES, de la 13-a ĝis la 20-a de julio 1984. Partoprenis ĝin 294 homoj el trideko da landoj, el pli malpli ĉiuj kontinentoj.

Kongresa temo estis "HOMO KAJ MAŜINO", kaj ĝi estis atente pritraktita far la partoprenantoj en pluraj studgrupoj kaj pere de pluraj prelegoj. La temo fontis el la konstatoj, ke pli kaj pli, en nia nuntempa mondo, akumuliĝas kaj komplikiĝas la rilatoj inter "homo" kaj ĉiuj tiuj aparatoj kiujn la homo mem eltrovis, inventis, por regi la ĉirkaŭantan medion kaj adaptigi ĝin al propraj deziroj, necesoj.

La kongreso interesiĝis aparte pri unu el la lastatempaj "maŝinoj", kies influo pli kaj pli sentiĝas en nia socio: la tiel nomataj komputiloj, okazis pluraj kursoj pri la lingvoj kiuj tiuj maŝinoj uzas, pri la socia rolo de tiuj aparatoj, pri

la influo kiujn ili havas sur la homa kapablo mem elpensi,projekti kaj organizi sian vivon. Oni diskutis ankaŭ pri la aliaj vivstiloj, la "senmaŝinaj", aŭ kun limigita kvanto-influo de la maŝinoj en la ĉiutaga vivo.

Kadre de la kongresaj ĉefkonferencoj, aparte menciindas la prelego de William AULD, pri "Kulturaj aspektoj de la Esperanto-komunumo", tre klara kaj klera rakonto pri la evoluo de la bazaj konceptoj pri la interpretado de la rolo de la lingvo Esperanto kaj de ĝia movado tra la preskaŭ cent jaroj de ties ekzisto.

Pro ekstera reklamo okazis pluraj intervjuoj ĉe lokaj radioj kaj televido kaj aperis artikolo en tre legata regiona ĵurnalo. La tuttaga ekskurso kondukis nin tra antikvaj vilaĝoj, en profundajn kavernojn, en bestoĝardenon. Aliaj programeroj kiuj rekte tuŝis la kongresan temon aŭ la distran flankon de la programo, estis kvizo pri la movado, projekciado de filmoj kaj maskobalo ktp.

Okazis ankaŭ pluraj renkontiĝoj de la superaj organoj de TEJO, ties Komitato kaj ties Estraro kunsidis plurfoje dum la semajno, plenumante siajn specifajn taskojn. Tre kontentiga novaĵo estas, ke dum la komitatkunsidoj en SWANWICK oni akceptis novan landan sekcion de TEJO: temas pri JES - la Junularo Esperantista Svislanda, kiu ekde tiu ĉi kongreso estas plenrajta Sekcio de TEJO.

Dank' al invito la Kongreson partoprenis reprezentanto de Internacia Unuiĝo de Studentoj, kiu havas sidejon en PRAGO.Oni traktis multajn eblecojn kunlabori, precipe nun okaze de la Internacia jaro de Junularo 1985 kaj ĝia ĉefa evento 12-a Monda festivalo de junularo kaj studentaro en MOSKVO 1985. Kiel reprezentanto de Ĉeĥa Esperanto-Junularo partoprenis la Kongreson prezidantino de Junulara sekcio Marie VANČUROVÁ, kiu samtempe laboras en estraro de TEJO.

## 12-A MONDA FESTIVALO DE JUNULARO KAJ STUDENTARO, MOSKVO, 1985.07.27. - 08.03.

La 12-a Monda festivalo de junularo kaj studentaro en Moskvo 1985 estos unu el la plej gravaj eventoj de Internacia Jaro de Junularo, kies okazon iniciatis WFDY /Monda federacio de demokratia junularo/ kaj aliaj junularaj organizoj. La festivalo eliras el longaj tradicioj de festivala movado kaj samtempe spegulas aktualajn taskojn de juna generacio en porpaca batalo, kontribuas al unuiĝo de junaj homoj de diversaj politikaj, filosofiaj kaj religiaj opinioj.

Je internacia nivelo okazas kunvenoj de Internacia preparkomitato /The International Preparatory Commitee of the Festival/. La unua "IPC" okazis februare 1984 en Havano, Kubo. La dua aprile en Sofio, Bulgario kaj la tria verŝajne okazos en Moskvo, oktobre 1984. Ĉiam partoprenas "IPC" pli ol 320 reprezentantoj de 190 naciaj, regionaj kaj internaciaj junularaj kaj studentaraj organizoj el 90 landoj.

TEJO ankaŭ estis reprezentita kaj kontribuis al la diskuto pri programo, okazigo ktp. per konkreta propono, ekz.:

- Ni kunlaboru dum preparlaboroj por la festivalo kaj dum ĝia okazo kun aliaj organizoj ne nur je internacia nivelo, sed ankaŭ je nacia nivelo. Certe partoprenadas "IPC" ankaŭ via enlanda junulara organizo. Reprezentantoj de JS-oj de TEJO kunlaboru kun nacia preparkomitato en sia lando;
- Hungara Esperanto-Junularo proponis kurson de Esperanto en Hungario por interesiĝantoj, reprezentantoj de diversaj preparkomitatoj kun la celo - lernigi ilin E-on por pli faciligi lingvan komunikadon;
- Eblas kunlaboro je kampo de junularaj laborbrigadoj, disvastigo de informoj pri la festivale ktp.

La festivalo estas granda amasa aranĝo. Estus utile amase partopreni ĝin, aranĝi karavanojn el diversaj landoj al la festivalo. Kun Junulara sekcio de ASE ni klopodos aranĝi kadre de la festivalo specialan Esperantan programon. Ni povas organizi biciklan karavanon al la festivalo, flugkaravanon el FRG tuj post IJK' 85.

Partopreno dum preparo kaj organizado de la festivalo povas esti bona ŝanco por plialtigi respekton de multaj JS-oj kaj E-aj junularaj organizoj.

NEPRE KONTAKTU VIAN PREPARKOMITATON POR LA FESTIVALO!

## S K I T A G O J  E N  K R K O N O Š E !

Ĉu vi volas travivi ĉarmajn kaj neforgeseblajn tagojn en la sorĉa regiono de Bohemio? Semajnon de perfekta skiado? En "Krkonoše" ekzistas bonegaj terenoj pro alpina skiado kaj ankaŭ por ski-kurado, suno, freŝa aero! Semajnon da preskaŭ komforta restado en montara domo, tamen malmultekosta, semajnon da komuna amuzo, dancado, tabla teniso, sed ankaŭ interesaj prelegoj kaj novaj kontaktoj kun junaj esperantistoj - skiantoj el kelkaj landoj de Eŭropo!

Se jes, vi tuj aliĝu al SKITAGOJ! Ni atentigas, ke tiu ĉi aranĝo estas preparita nur por tiuj, kiuj kapablas skii.

Jen nia konkreta oferto:

DATO: fino de januaro /komenco lunde, fino dimanĉe/. Pli precizigita dato poste.
LOKO: proksime de ŠPINDLERŮV MLÝN, konata sportcentro en montaro KRKONOŠE, norda parto de Bohemio.
PREZO: Kčs 250,-- /ne enkalkulas manĝaĵon/.

Kunprenu bazajn manĝojn, ĉar ni ne zorgos pri kuirado por ĉiuj. Vi mem kuiros en granda kuirejo. Nur matenmanĝon kaj vespermanĝon, tage ni kompreneble skios.


Plurajn informojn vi ricevos post forsendo de aliĝilo al adreso: Junulara sekcio de ČEA, Jilská strato 10, 110 00 PRAGO 1 - STARÉ MĚSTO /Malnova urbo/, ČSSR.

**Aliĝintaj el ČSSR devas kalkuli kun antaŭpago maksimume ĝis 1984.12.31. pere ricevota poŝtmandato. Eksterlandanoj povos pagi surloke.**

# 41-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

**22-29.7.1985**

okazos en la vilaĝeto ERINGERFELD en lernejo por 1000 da junuloj. Kongresanoj loĝos en moderna konstruaĵo kun tre riĉe ekipitaj 1 - kaj 2 - litaj ĉambroj. Ĝis 25 jaruloj pagos/ se vi pagos surloke/ 230 DM. Aliĝu al Germana E-o Junularo, Pf.101422 D-2000 HAMBURG



# ni recenzas

NORVEGUJO. Teksto Bjørn JENSEN. Tradukis E.A.Haugen. Eldonis Reĝa Norvega Ministerio de Eksteraj Aferoj. SENPAGE HAVEBLA ĉe Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schousv.18, 0572 OSLO. Paĝoj 16 + 8, formato 30 x 21 cm.

Vere bela granda kaj interesa turisma prospekto pri la nordeŭropa konstitucia reĝolando, kun 47 koloraj fotoj sur 6 paĝoj, 2 koloraj tutpaĝaj mapoj /unu anglalingva/ kaj 16 paĝoj da teksto kun 25 desegnaĵoj, skemoj kaj mapetoj.

Laŭ sia areo, Norvegio apartenas al la plej grandaj landoj en Eŭropo, sed kun siaj 4 milionoj da loĝantoj ĝi estas malgranda. Oni informiĝas pri historio kaj ĉiuj flankoj de la vivo. La baza lernejo estas naŭjara kaj vizitado de ĉiuj lernejoj, escepte malgrandan nombron da privataj, estas senpaga,inkluzive altlernejojn. Oni instruas en du idiomoj: bokmål kaj nynorsk.

Ekonomie estas interesa precipe la ekspluatado de gaso kaj nafto en la Norda Maro.

La lando estas tre alloga kaj vizitinda, precipe pro multaj belegaj fjordoj, kiajn posedas neniu alia lando en la mondo.

A. Staŭura

Marjorie Boulton: FAKTOJ KAJ FANTAZIOJ

La eldona agado de UEA iĝas ĉiam pli intensa. Nun ĵus aperis /julio 1984/ la longe atendita legolibro de la fama verkistino Marjorie Boulton. La libro estas broŝurita kun dukolora kovrilo, speciale desegnita de Franko Luin. Ĝi estas ilustrita i.a. per desegnaĵoj de Alex Brychta. La formato estas A5 kun 431 paĝoj, inkluzive de glosaro kaj biografio pri la autorino.

La verkado "Faktoj kaj fantazioj" estis speciale komisiita de UEA por tiuj, kiuj apartenas al la kategorio progresantoj. Kvankam la aŭtorino en la antaŭparolo diras, ke "ne eblas difini tiun kategorion kun zoologia precizeco", ĝi certe inkluzivas tiujn, kiuj finis elementan kurson de Esperanto kaj deziras daŭrigi. Tial la gvidantoj de progresigaj kursoj trovos la legolibron aparte utila, sed la autorino celis ankaŭ la multajn memlernantojn.

"Faktoj kaj fantazioj" ekzercigas pri frazkonstruado kaj pligrandigas la vortostokon de la leganto. Uzante simplan stilon, Marjorie Boulton sisteme enkondukas utilajn esprimrimedojn. Bona lernilo devas esti interesa. Tion la verkistino lerte atingas en 52 variaj ĉapitroj, plenaj de fabeloj, mirindaĵoj kaj rakontoj pri homaj atingoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo. Ili igas la leganton streĉe atenti, miri, kortuŝiĝi kaj ridi.

La aŭtorino estas matura, socie engaĝita literaturisto- unu el la plej produktivaj kaj ŝatataj en Esperanto. Ŝi scias instrui kaj amuzi kaj havas senton pri humuro.

Eldona Fako de UEA

Mats Traat: DANCO ĈIRKAŬ LOKOMOBILO

Romano de estona verkisto. Tradukis Hillar Sáha kaj Henrik Seppik. La postparolon verkis August Eelmäe. Aperis en Estonio 1984.

La baza temo de la romano estas farto de la estonaj kampulo kaj vilaĝo en la 20-a jarcento.

Verkaro de Mats Traat ricevis plurajn literaturajn premiojn de la Estona Respubliko. Parto de lia poezio kaj prozo estas tradukita en la germanan, rusan, finnan, latvan kaj aliajn lingvojn.

E. Ratassepp

Konstantin Ustinoviĉ ĈERNENKO: GARDI LA PACON, ZORGI PRI LA BONO DE LA POPOLO. Tradukis L. Novikova kaj B. Kolker.Eldonejo de Presagentejo Novosti, Moskvo, 1984. Paĝoj 29, formato 12,5x 19,5 cm.

La broŝuro enhavas du paroladojn de la ĝenerala sekretario de CK de KPSU k-do K. U. Ĉernenko, kiu transprenis la altan funkcion post forpaso de k-do J. V. Andropov.

En sia elpaŝo antaŭ elektantoj de la balota regiono Kujbiŝevskij en Moskvo parolis k-do Ĉernenko pri laborsukcesoj de laboristoj, pri planplenumado kaj pri perspektivoj, kiuj atendas la laboristan klason. Sed li ankaŭ menciis mankojn kaj aferojn plibonigendajn en la ekonomia kaj politika sferoj.Ĉe la fino li parolis pri la pacaj iniciativoj de USSR kaj pri streĉo en la internaciaj rilatoj, kian kaŭzas la militarisma politiko de Usono.

La dua publikigita parolado okazis, kiam k-do Ĉernenko estis elektita kiel ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de KPSU. Li omaĝis al forpasinta k-do Andropov kaj poste parolis pri la interna ekonomia kaj politika situacio. Ankaŭ la internaciajn rilatojn de USSR li pritraktis kaj finis per esprimo pri fido, ke KPSU havas garantiitajn premisojn por sukcesa solvo de la grandaj kaj komplikaj taskoj de la komunisma konstruado.

La libreto estas belguste ekipita, sur bona papero presita kaj lingve bona, krom kelkaj negravaj detaloj. Ĝi estas grava

dokumento pri atento, kian la sovetiaj instancoj dediĉas al nia afero, publikigante gravajn deklarojn de sia ŝtatestro en Esperanto.

A. Stanura

.................................................................

NEZAPOMEŇTE, ŽE VČASNÁ PLATBA VAŠEHO ČLENSKÉHO PŘÍSPĚVKU POSILUJE NEJENOM EKONOMICKY EXISTENCI NAŠÍ ORGANIZACE. TVOŘÍ V POSLEDNÍM OBDOBÍ ASI PĚTINU VŠECH SVAZOVÝCH PŘÍJMŮ, ALE JE I MORÁLNÍ PODPOROU TĚCH, KTEŘÍ SE SNAŽÍ UDRŽET DOBRÝ CHOD SVAZU. PŘÍMÍ ČLENOVÉ NECHŤ NEČEKAJÍ A PLATÍ PŘÍMO NA NÁŠ ÚČET u SBČs PRAHA 2, č.ú. 3330-021.

.................................................................

# KRONIKO

La 22.10.1984 forlasis niajn vicojn sekve de trafikaverio nia multjara membro, longjara sekretario de E-klubo en CHEB inĝ. Václav J A N D Í K. En novembro 1984 li ĝisvivus 81 aĝojn. Ni elkore kondolencas al ĉiuj liaj gefamilianoj kaj geklubanoj!

En Slezská Ostrava mortis la 3.10.1984 fidela membro de E-klubo en FRÝDEK-MÍSTEK kaj ĝisviva membro de ĈEA, 90-jara Eduard M Á C H A. Li esperantiĝis en 1921 kaj ankaŭ partoprenis la UK-on en PRAGO. Dum la dua mondmilito la savis kaj deponis en sia loĝejo parton de la bonfama biblioteko de la Esperantista klubo en Prago. Ĉiuj gefamilianoj kaj geklubanoj akceptu niajn profundajn kondolencesprimojn.

HONORON AL ILIA MEMORO!

## J o s e f V O N D R O U Š E K 80 - j a r a !

En nacilingvaj gazetoj oni ofte legas, ke iu fama persono solenas sian memorindan vivjubileon, sen indiko kioman. Koncerne s-anon VONDROUŠEK ni diras malkaŝe, ke li la 1-an de decembro 1984 atingos maloftan aĝon de 80 jaroj ĉe plena aktiveco kaj korpa kaj spirita. Prezenti lin al niaj legantoj ne necesas. Plejparto lin konas persone, la resto aŭdas ofte pri lia laboro. Tamen decas mencii kelkajn detalojn el lia vivo.

Li naskiĝis en infanriĉa, sed materie modesta familio, li studis Komercan akademion kaj poste laboris kiel bankoficisto. De la gepatroj li heredis amon al la muziko, al la beleco kaj persistan laboremon. Li havas krom sia familio du grandajn amojn: violonludon kaj Esperanton. La unuan li reservas nur por si mem, per la dua li klopodas efektivigi la idealon de d-ro ZAMENHOF. La internacia lingvo ne estas por li hobio, sed vivtasko, al kiu li dediĉas ĉiun liberan tempon.

Li esperantiĝis kiel studente. Konforme al sia karaktero li volis ellerni la lingvon ĝisfunde. Trastudinte la Plenan Vortaron li mem fariĝis vivanta vortaro. Aliĝinte al EK en BRNO li tuj fariĝis ĝia sekretario, sed baldaŭ oni elektis lin prezidante kaj ĉi tiun funkcion li plenumas mallongaj interrompoj ĝis nun. Krom tio li estas komitatano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

En la klubo li gvidas kursojn kaj jam longajn jarojn li instruas somere en SET-LANĈOV. Al lingvokursoj ĝenerale aliĝas multe da personoj, poste de unu leciono al la alia iom post iom la kursanoj forfalas - kaj ĉe la fino restas nur kelkaj aŭ neniu. S-ano VONDROUŠEK finas kutime kun la plena nombro.

Tiun ĉi formikan kaj preskaŭ sisifan laboron nur malmultaj homoj eltenas. S-ano VONDROUŠEK serĉas refreŝiĝon en tradukado. Li tradukas programerojn por klubaj vesperoj, sed precipe beletron de diversaj ĉeĥaj aŭtoroj. La plej ŝatata inter ili estas Karel ĈAPEK.

Libre aperis LIBRO DE APOKRIFOJ kaj RAKONTOJ EL LA UNUA KAJ EL LA DUA POŜOJ. En manuskripto restas FABELOJ, EL LA VIVO DE INSEKTOJ, BATALO KUN SALAMANDROJ, HORDUBAL, METEORO k. a.

Ankoraŭ estas multo direbla. Kion do aldoni? Deziron al la kara jubileulo KE LI ANKORAŬ LONGE EN SANO KAJ KONTENTO PLUGU SIAN PROFUNDAN SULKON SUR LA KAMPO DE LINGVO INTERNACIA!

-TB-

Martina Kadlecová kaj Jan Navrátil enocis, ke geedziniĝis 03.11.1984. Gratulon kaj ĉion plejbonan !

# RONDETA VIVO

JABLONEC NAD NISOU

Dum la 21-a ĝis 23-a de septembro 1984 okazis en nordbohemia urbo JABLONEC NAD NISOU jam la 18-a jarkonferenco de FERVOJISTA SEKCIO DE ĈEA. Partoprenis gastoj el GDR, Aŭstrio kaj Slovakio.

En la urbo, fame konata pro siaj vitraĵoj, bijuterio kaj aŭtomobiloj, ĉeĥaj fervojistaj esperantistoj pritaksis sian tutjaran agadon kaj preparis planon por venonta jarperiodo.

Sabate antaŭtagmeze ili komune vizitis montaran fervojlinion TANVALD- KOŘENOV - HARACHOV. Tiu ĉi fervoja linio estas unusola normalŝpura ĝis nun funkcianta fervojlinio de sia tipo sur la tuta eŭropa kontinento. Ĝi longas 11,6 km kaj havas 4,43 km de duzona dentradsistemo de la tipo Abt.

En fervojstacio KOŘENOV ni vizitis ankaŭ konstantan ekspozicion pri la historio kaj nuntempo de tiu ĉi fervoja linio.

El la posttagmeza labora parto indas mencion prelego kun lumbildoj far kolego Jar. KAŠPAREC, prezidanto de FS ĈEA, pri la lasta 36-a IFEF-kongreso en SLÂNĈEV BRJAG, raporto pri ĉijara 1-a kongreso de polaj esp.fervojistoj en TARNOWSKIE GÓRY kaj prelego de kolego DAVIS, prezidanto de TK pri komenco de fervoja tekniko sur teritorio de ĉeĥaj landoj.

Kvankam dimanĉa vetero ne favoris la renkontiĝon, tamen ni forveturadis el JABLONEC N. NISOU kontentaj kaj kun multaj belaj travivaĵoj, kontentaj pri farita laboro kaj pro nove faritaj kontaktoj kaj planoj por venonta ankoraŭ pli riĉa agado de la E-fervojistoj.

J. Tomíšek

P R A H A

Dum 4-a Renkontiĝo en DRESDEN /GDR/, kiun organizis la GDR EA inter la 28-a kaj 30-a

de septembro 1984 en harmonio kun agadplano de Esperantista Klubo en Praha por la jaro 1984, oni pritraktis daŭrigadon kaj pli profundigon de kunlaboro inter Esperantista Klubo en Praha kaj E-klubo Berlin-Lichtenberg. E-klubon Berlin-Lichtenberg anstataŭis s-ano Achim MEINL.

P Ř Í B O R

La 21-an de junio 1984 ni solenis dudek jaran jubileon de la finkonstruo de Esp. monumento de Theodor ČEJKA, kiu studis fine de pasinta jarcento en PŘÍBOR en pedagogia instituto.

Nia soleno konsistis el du partoj. Je la naŭa horo antaŭtagmeze kunvenis ĉeestantoj ĉe monumento, kie alparolis Ant. VODIČKA rememorinte signifon de Th. ČEJKA, kiel fondinto de Esp. movado en niaj landoj. Lernantino KLAUDOVÁ prezentis mallongan poemeton en ĉeĥa lingvo "Byli jste první" /vi estis la unuaj/.

Dua parto estis en urba muzeo, kie Esperanta arĉkvarteto prezentis sian programon muzikan el verkoj de MOZART kaj kvarteto de F. Míča kaj kvarteto de V. Nudera / Divertimento en G-dur/.

La saman programon E-kvarteto prezentis la 16-an de septembro ĉi jare en MÍSTEK okaze de komenca postferia kunveno de esperantistoj el MÍSTEK kaj ĉirkaŭaĵo.

ÚSTÍ NAD LABEM

En la tagoj 17-a kaj 18-a de oktobro 1984 aranĝis la E-rondeto ĉe ODKP tri efikajn k. interesajn prelegojn de s-ano František PATERA el HOŘICE V PODKRKONOŠÍ pri Japanio. La 17-an li prelegis kun diapozitivoj ĉe la Rondeto de Internacia Amikeco kaj Paca Aktivado de studentoj de 3-a kaj 4-a klasoj de la Pedagogia Fakultato. Lian prelegon sekvis multaj demandoj de la aŭskultantoj. Precipe interesis liaj peresperantaj ebloj ekkoni dum sia 19-taga vizito profunde la familian vivon de japanoj. Skuaj estis liaj bildoj kaj spertoj el HIROŜIMO. Oni kelkion eksciis pri la progresoj de japana industrio kaj scienco, pri la granda oferemo kaj afableco de la japanaj samideanoj-gastigantoj.

Similan prelegon aŭskultis la 18-an la lernejanoj de la 7-a kaj 8-a klasoj de la Baza lernejo ĉe la Pedagogia Fakultato, kaj ankaŭ tie vekis eksterordinaran intereson kaj diskuton.

Samtage vespere prelegis s-ano PATERA en la Malgranda Scenejo de la Kulturdomo ODKP por la membroj de la Esperanto-rondeto kaj alinvititaj anoj de la ceteraj interes-rondetoj ĉe ODKP. Ĉiuj tri prelegoj estis sukcesaj.

Pri la organizo ĉefe meritas s-ano doc. d-ro Vlastimil NOVOBILSKÝ, CSc.

JK

PRI ESPERANTISTOJ SUR MAPO

OSTRAVSKO estas mapo de ĉirkaŭaĵo de la urbo Ostrava, eldonita en 50 000 ekz. far la Geodezia kaj kartografia entrepreno en Prago. Sur la dorsa flanko estas presitaj detalaj klarigoj pri atentindaĵoj. Sub "Bohumín" estas menciita la monumento de ZAMENHOF, kaj sub "Velká Čantorije" /monto sur ĉs.-pola limo/ oni legas, ke sur ĝi kunvenadis esperantistoj kaj ankaŭ funkciuloj de la komunistaj partioj inter la du mondmilitoj. - Jes, tie kunvenadis ĉiam en junio ĉeĥaj, polaj kaj germanaj samideanoj el vasta ĉirkaŭaĵo, ĝis kiam la disŝiro de ČSR en oktobro 1938 finis la kunvenadon. Post 1945 la renkontiĝoj estis renovigitaj, sed ili fariĝis malpli popularaj.

-Ast-

B R N O

Kurson por komencantoj, komencitan la 2.10.1984 partoprenas 14 personoj, kurson por progresintoj 18. Ambaŭ gvidas J. Vondroušek.

VESPERO DE MONOLOGOJ far Eva Seemanová allogis multajn homojn. Vesperoj kun E. Seemanová estas famaj kaj ege ŝatataj de la esperantista publiko. La monologoj okazis la 09.10.1984 kun bonega partopreno.

Solena koncerto al la 40a datreveno de Slovaka Nacia Ribelo okazis la 16.10.1984 sub artisma gvido de H.Supová-Halířová. La programo estis riĉa kaj belega. Kantis merita artisto V. Halíř, kantis solistoj el Lidová škola umění, Brno XII kaj ankaŭ ĥoro, okazis violonĉela koncerto, recitoj k.a. La programo kulminis per prezennto de la Malfermado de Putoj de B. Martinů. La publiko en plena salono ovaciis la artistojn.

---

## KORESPONDI ✽ DEZIRAS ✽ ANONCOJ

Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kĉs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turniĝu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Tatjana BRONŜTEJN /35-j/, Mikrorajon 6-1-17, TIĤVIN, Leningradskaja obl., 187500 USSR, dez.kor.kaj interŝanĝi literaturon pri makrameo.

Sinjorino Edith HÄHNSEN, dez. kor.kun ĉ.l.pri turismo. Ŝi ŝatas viziti fremdajn landojn k. ankaŭ bezonas E-adresojn el Prago. Adreso: Str.d.Befreiung 15, DDR - 357 GARDELEGEN.

S-ro John JOHNSON /58-jara/, 17 Seeleyes, HARLOW, Essex, Anglio, elektronika inĝeniero, dez. kor.pri klasika muziko kaj fotografio.

S-ro Stan BRICKNELL /66-jara pensiulo/, 11 Upper Stonyfield, HARLOW, Essex, Anglio, dez.kor.pri klasika muziko kaj arto.

D-ro Akwasi Owusu OSEI /26-jara kuracisto/, Komfo Anokye Teaching Hospital, P.O.Box 1934 Kumasi, GHANO petas korespond-adresojn el la tuta mondo.

A. Ekué FOLEY, B. P.13528, Lomé-Nyekonakpoe, TOGO, dez.kor. precipe pri sia fako /radio - tv. - teknikoj/ kaj esperas ricevi donace iom da elektronikaj materialoj kaj dokumentoj.

Hiag EKANGA /20-jara/, s/c M.BELL Jacques, B.P.1323, DOUALA, KAMERUN dez./pliajn/korespondantojn precipe el Nederlando, Belgujo kaj Svisujo, sed ankaŭ el aliaj landoj.

Eric DOKOUI, s/c W.Bernard, P.T.T. APLAHOUÉ, BENINO /18-jara lernejano/ dez.kor.kun l.t. mondo.

François AKPA /18-jara/, s/c Fangon JACQUELINE, Institutrice à l'Ecole de Base de Cadjéhoun, Groupe "C", B.P.434, COTONOU, BENINO, dez.kor.

Djamel BOUMEDIENE, B.P.432, 23-jara studento, Ilemcen, ALĜERIO dez.praktiki la lingvon korespondo.

Kiu vendos PRAKTIKAN BILDVORTARON DE ESPERANTO, Oxford 1979, skribu al: František POHORSKÝ, TEČOVICE 185, 76302 GOTTWALDOV, Ĉeĥoslovakio.

Renato CORSETTI kaj Anna BRENNAN informas ke ilia nova adreso estas: Colle Rasto, I - 00039 ZAGAROLO, Italujo.

Hana Zimmermannová, Frýdnava 5 582-81 Habry, ČSSR, 14 jaraĝa knabino kolektas PM, BK.

Lubomír Kučera, 36 jaraĝa laboristo, Lipová str. 597/9, CS - 460 01 LIBEREC IV, interŝ. ĉion kio temas de biero kun kolek - tantoj tutmonde.

Marie Černovská, 12 jaraĝa knabino, CS- 582 81 HABRY 332, volas korespondi E-e, ruse kaj anakaŭ ĉeĥe.

Alena Selvová, 21 jaraĝa esperantistino, Na Samotě 826/16 , CS - 743 01 Bílovec serĉas gekorespondantojn tutmonde.

Izolda ANDRÁS, 17-jara studentina, 4157 LUETA 463, Harghita, Rumanio, dez.kor. pri lit., arto, muziko, sporto k. vivo de junularo.

Margit GYÖRGY, 17-jara studentino, 4157 LUETA 516, Harghita, Rumanio, dez.kor. pri literaturo, arto, muziko, sporto kaj pri vivo de junularo.

Anna FEKETE, 16-jara studentino, 4159 OCLAND 118, Harghita, Rumanio, dez.kor.pri lit., arto, muziko, sporto k. vivo de junularo.

Ilona SIMON, 15-jara studentino, 4192 ŞICLOD 415, Harghita, Rumanio, dez.kor.pri lit., arto, muziko, sporto k. vivo de junularo.

## INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

KIO NOVA EN NIA ASOCIO ?
Kunvenis la Centra Komitato de nia asocio fine de oktobro por trakti gravajn eventojn en la vivo de asocio. Estis akceptitaj Agadplano kaj buĝeto por la jaro 1985, programo por la Jubilea Jaro. CK aŭskultis kelkajn informojn de la Centra Kontrola kaj Revizia Komitato.


# *Poeto* ne mortas

Antologio el la verkaro de FRANTIŠEK KOŽÍK , merite ĉeĥa artisto, prezidanto de la Literatura Sekcio de ĈEĤA ESPERANTO A - SOCIO aperis sub redaktado de inĝ. Margit Turková kiel broŝurento en la edicio PACO. Vi povas ĝin mendi en nia asocio. La prezo nur 4,--Kčs/ sen sendokostoj/.



Svazové zkoušky ze znalostí esperanta se budou konat 20.04.1984 Zájemci nechť se obrátí o bližši informace přímo na níže uvedenou adresu : Karel F r a n c, Dukla 2287, 530 02 Pardubice.

# Co je nového v BORU ?



Bilancujeme dosažené výsledky od započetí výstavby, která byla zahájena dne 4. května 1984, do dnešního dne.

Podařilo se nám, že jsme dokončili hrubou stavbu včetně podkrovní části, byla smontována střešní konstrukce a položena krytina. Tím byly vytvořeny podmínky pokračovat v příštím roce tak, aby celá polovina rekonstruované budovy byla kompletně dokončena. To samozřejmě platí za podmínky dostatečného přílivu pracovních sil. K tomu je nutne vytvořit nezbytné předpoklady zejména ze strany vedoucích orgánů svazu, vedení místních skupin, sekcí a komisí. Ale i tak vás prosíme, nenechte vše jenom na několika jednotlivcích.

Máme již členy, kteří odpracovali na této výstavbě více než 100 hodin a dva z nich dokonce více než 200 hodin. Celkem bylo věnováno na výstavbu v Boru ze strany našich členů, ale i nečlenů, přes 1.550 hodin. Hodnota provedených prací se odhaduje na více než Kčs 150.000,--. Ústřední výbor jmenoval na svém posledním zasedání tříčlenou komisi pro výstavbu, jejímž předsedou se stal s. Evžen DADÁK. Znovu ale zdůrazňujeme, že komise sama rekonstrukci dokončit nemůže.

Máte tedy příležitost nahlásit váš závazek sekretariátu, nebo přímo na adresu: Evžen DADÁK, Louky nad Olší 575, 735 - 73 KARVINÁ. Fotografie ukazuje stav objektu k 20.11.1984.

AŬSTRIA RADIOFONIO ORF - ESPERANTA REDAKCIO

Aŭstria Radiofonio ORF, E-redakcio, disaŭdigis la 12.8.1984 pri la temo "60 jaroj Esperanto en Radio Vieno". La sensacieto de la unua emisio okazis je la 8-a de aŭgusto 1924. Meze de majo 1925 Vieno disradiis sian unuan Esperanto-kurson.

## K O R - X I

KOR - tiel nomiĝas la soveta enlanda Esperanto - renkontiĝo. Organizas ĝin kiŝineva] kaj odesaj Esperantistoj. Ĉiujare ĝi okazas dufoje, printempe en la havenurbo ODESO kaj aŭtune en la moldava ĉefurbo KIŜINEVO.

Se vin interesas pluaj informoj skribu al la adreso: Vladimír GIRBA, u.Floreŝti,p.k. 10, 279800 Sovet-Unio,Moldavio.

## SISTEMOJ KAJ MODELOJ DE LA PUBLIKA KLERIGADO

La Kultura Komisiono de Hungara Esperanto-Asocio kaj la Asocio de Hungaraj Klerigistoj organizos konferencon pri publika klerigado inter la 21-a kaj 25-a de marto 1985 en BUDAPEŜTO. La temo de la konferenco estas "Sistemoj kaj modeloj de la publika klerigado.

EL LA PROGRAMO DE LA KONFERENCO:
- entute proksimume 12 horaj prelegoj kaj diskutoj;
- vizito al klerigaj kaj kulturaj instancoj;
- promenado en BUDAPEŜTO;
- vizito de esperantlingva teatra prezentado.

ALVENO 21-an de marto 1985 de 10-a ĝis 18-a horo al la Konferencejo: BUDAPEŜTO, XI-a distrikto, strato Bartók Béla ut nro 152, "F" parto. MANĜADO: Unua vespermanĝo 21-an, la lasta matenmanĝo 25-an de marto 1985. PARTOPRENKOTIZO: ĝis 28-a de februaro 1985 Kčs 1.080,--. La partoprenkotizo inkluzivas la kostojn de tri manĝadoj po tage, tranoktejoj en trilita ĉambro, programoj de la konferenco, du biletoj por teatro kaj du biletoj por muzeoj. Oni povas aliĝi ĝis 28-a februaro 1985.Pagi vi povas pere de ĈEA.

Leteradreso: Kultura Komisiono de HEA, Pf.193, H-1368 BUDAPEŜTO.

## PRAHA STÁLE NOVÁ A STÁLE STARÁ

Kniha o Praze "STÁLE NOVÁ A STÁLE STARÁ" byla konečně dána do tisku. Zdržení nastalo pro nutnost provést několik korektur původní sazby. Je tedy pravděpodobné, že bude dodána do sekretariátu koncem 1. čtvrtletí 1985.

## DENOVE TEATRA FESTIVALO EN BUDAPEŜTO

Inter la 22-a kaj 26-a de marto 1985 okazos en BUDAPEŜTO denove grava teatra evento en Esperanto. Dum kvin tagoj okazos entute 7 teatraj prezentadoj Esperantlingvaj en la Budapeŝta Teatro "RADNÓTI". Jen la detala programo:

1985.03.22. 19-a horo:
J. Elem: BETONTERAPIO
F. Kafka: LETERO AL LA AKADEMIO
/Du unuaktaĵoj, en la plenumo de hungaraj geaktoroj./
1985.03.23.:
15 h. S.Petőfi: JOHANO LA BRAVA /Pupteatra prezentado/
19 h. L. Tabi: LA DAMO DE L' FATALO /Komedio, en plenumo de hungaraj geaktoroj/
1985.03.24.:
15 h. E.Kastner: TRI VIROJ EN LA NEĜO /Komedio en la plenumo de Bulgara Esperanto-Teatro/
19 h. J. Elem: BETONTERAPIO
S. Beckett:LA LASTA MAGNETOFONBENDO DE KRAPP /Du unuaktaĵoj en la plenumo de hungaraj geaktoroj/
1985.03.25.:
19 h. L. Tabi: LA DAMO DE L' FATALO /Komedio, en plenumo de hungaraj geaktoroj/
1985.03.26.:
19 h. Parada revua programo de ĉiuj partoprenintaj geaktoroj.

Biletoj aĉeteblas en la Librovendejo de Hungara Esperanto-Asocio. Dezirantoj partopreni turnu sin al la Turisma Komisiono de HEA /Pf.193, H-1368 BUDAPEŜTO/, kiu rezervas malmultekostajn tranokteblojn en BUDAPEŜTO dum la nomita periodo. Eksterlandanoj, kiuj deziros havi krom la teatraj prezentadoj ankaŭ aliajn programojn en BUDAPEŜTO, skribu al la Esperanto-Sekcio de la Turisma Oficejo Express /BUDAPEST V., Szabadság tér 16./.

## KOLIK MÁME ČLENŮ ?

Počátkem listopadu 1984 nám "sdělil" náš počítač, že evidu- je celkem 2.487 platících členů, z toho v kategorii A - 1.266, v kategorii B - 551, C - 12, D - 156, E - 249, F - 244 a v kategorii G /čestný člen svazu/ 9. Podaří se nám tento stav v roce 1985 zvýšit?

## TUTMONDA ESPERANTA BIBLIOTEKISTA ASOCIO

Antaŭ deko da jaroj fondiĝis INTERNACIA ESPERANTO-ASOCIO DE BIBLIOTEKISTOJ. La Esperanta gazetaro lojale raportis tiun faron, sed bedaŭrinde pro tiama manko de laborfortoj la iniciato ne sukcesis.

Nun venas nova provo, sub la nomo TUTMONDA ESPERANTA BIBLIOTEKISTA ASOCIO, kun la deziro krei solidan bazon de tiu asocio antaŭ la centjariĝo de Esperanto.

La celoj de la Asocio estas kunligi esperantistoj-bibliotekistojn, diskonigi pere de la bibliotekoj de la mondo kaj per Esperanto helpi la laboron de bibliotekoj.

Ĉiuj interesiĝantoj, ankaŭ la posedantoj de privata Esperanto-kolekto, povas kontakti kun la Asocio pere de la adreso: Tutmonda Esperanta Bibliotekista Asocio /TEBA/, Geoffrey King, provizora sekretario de TEBA, 228, Capworth Street, LONDON-E10 7HL, G.B.

## 70-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO 1985

AUGSBURG

La 70-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en 1985-a jaro en AŬGSBURGO inter la 3-a kaj 10-a de aŭgusto 1985. Kiu planas private veni /nia asocio ne certigas karavanon pro malgranda intereso/ kalkulu kun jenaj kongreskotizoj:

1. Kongresano - ne individua membro de UEA 219 gld
2. Kongresano - individua membro 188 gld
3. Kongresano - kunulo /junulo, handikapulo/ kiu ne estas individua membro de UEA 156 gld
4. Kongresano - kunulo /junulo, handikapulo/ kiu estas individua membro de UEA 125 gld

## ESPERANTA PROSPEKTO PRI URBO DINAN, BRETONIO, FRANCIO

Ni estis informitaj, ke oni preparas eldoni turisman libreton pri bretonia urbo DINAN. Se vi volas havi ĝin, skribu kaj demandu esperantlingvan prospekton al: S-ro Jean DAMANNE,6 Rue de l'Horloge, 22100 DINAN, Bretonio, FRANCIO.

## ELI URBANOVÁ GAJNIS DUAN PREMION

Dum la poezia konkurso "INTERNACIA AMIKECO" en TRIESTE,Italio gajnis nia bonfama poetino Eli URBANOVÁ la duan premion al poemo DOLORO! Ni ĉiuj elkore gratulas!

La 1-an premion gajnis Rejna de JONG, Nederlando, al poemo MAJA TAGO kaj la 3-an al poemoj: PAPILIOJ de Tibor Bessenyei , Hungario, KIAL de Ada ACETO, Italio kaj AĜOJ de Lucia MIANO, Italio.

## 71-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO 1986

La 71-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en la jaro 1986 en PEKINO, Ĉinio inter la 26-a de julio kaj 2-a de aŭgusto 1986. Konstanta adreso: UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAMO, Nederlando. Adreso de LKK: P.O.Kesto 77, BEIJING /PEKINO/, Ĉinio. Poŝtĉekkonto de la Kongreso: n-ro 62 73 37 /nederlanda/. Banko de la Kongreso: AmRo Bank, ROTTERDAM, n-ro 42.69.01.444. Speciala favora tarifo validas nur ĝis 31-a de decembro 1985.

## EL KARLOVY VARY EN TUTAN SOVETION

Okaze de la 67-a jubileo de Granda Oktobra Socialisma Revolucio la loka grupo de ĈEA en Karlovy Vary aranĝis la 12-an de novembro 1984 jam tradician l e t e r v e s p e r o n . En kadro de la Monato de Ĉeĥoslovaka - Sovetia Amikeco karlovaraj esperantistoj reciproke interŝanĝas salutleterojn, bildkartojn kaj diversajn poŝtaĵojn kun geamikoj el Soveta Unio. Karlovaranoj havas jam ampleksan kaj belegan kolekton de ricevitaj interesaĵoj: jen venis elkora saluto kun kolekto da bildkartoj el sudsovetiaj urboj Baku, Soĉi; jen el la siberiaj urboj Novosibirsk, Krasnojarsk kaj Niĵnevartovsk. Ne malfruiĝis la respondo el ĉebaltaj regionoj - el Tallin - kaj ankaŭ el Leningrado. Daŭre plifortiĝas varmaj rilatoj kun gesamideanoj el Samarkando, Duŝanbeo, Taŝkento - speciale post la persona vizito de karlovaranoj nunprintempe en Sovetia Centra Azio. Jam longe daŭras nia korespondado al Doneck, Krasnodar kaj Ĵdanov. Pere de kolora broŝureto prezentis sian Kazaĥan Respublikon gesamideanoj el Alma-Ata. Neniam mankas ĉe la letervesperoj sendaĵo el Tiĥvin. Nunjare ĉiujn surprizis amaso da koloraj bildkartoj el la ĉefurbo de Sovetio - Moskvo. Karlovaraj esperantistoj sendis salutleterojn ankaŭ al Tbilisi, Jerevan, Sverdlovsk, Ivanovo, Urgenĉ kaj alien. Neforgeseblaj estas vortoj de s-ano Valerij Maliŝin en la letero de la krasnojarska klubo: "Ĉiu pacbatalanto devas havi eksterlandajn amikojn - estas necese havi geamikojn en la mondo por paco. Esperanto devas servi por la paco, ĉar ĝi maskiĝis el forta deziro por paco. Ni ĉiuj konsideras ĝin lingvo de amikeco."

Alena Klementová

## Internacia Esperanto Klubo Aŭtomobilista
## I. E. K. A.

preparis planon de EŬROPO por helpi al la aŭtomobilistoj,kiuj veturos al la kongreso de AŬGSBURG. Sur tiu plano estas ĉiu urbo kie loĝas UEA - delegito de IEKA kaj pri turismo, gastigado, SOS- aŭtoservo ks. Kiu volas ricevi ĝin skribu al : IEKA, J.GUILLAUME, 66,DE GRASSE VILLAGE, F-78810 FEUCHEROLLES.

## IFER 1985 LEIPZIG

de la 8a-10a de marto 1985. Vi povas partopreni pere de nia asocio .

## URBO DE LA MUZIKO

Aliĝu ĝis la 31.01.1985. La tuta aranĝo poste vin kostos /manĝo kaj trenoktoj/ nur 395 Kčs. Pluajn informojn sendos al vi kaj aliĝilojn ORGANIZA KOMITATO DE IFER, DDR 7010 LEIPZIG, KÄTHE-KOLLWITZ - STR: 115.

## INDIO KAJ ESPERANTO,

antaŭ ne longe ni ricevis jenan leteron el kiu ni anoncas : " Ni havas bonokazon informi vin ke la dua tutlanda Esperanta Kongreso okazos de 01.02 - 03.02.1985 en Kalkato. La centra Ministerio pri eduko malfermos la Kongreson kaj multaj elstaraj personoj ĉeestos... Ĉar ni planas okazigi ekspozicion pri Esperanto ni petas vin, se vi povas, sendi ekspoziciaĵojn kiel bildojn,festonojn, afiŝojn, librojn, flugfoliojn, insignojn.. broŝurojn kaj gazetojn aŭ revuojn pri Esperanto.... Post tiu kongreso ni organizos pluajn ekspoziciojn en diversaj urboj , universitatoj kaj ni, do, poste konstante utiligos viajn sendaĵojn.
Ni kredas al via spirita kaj materiala helpo. Viajn sendaĵojn adresu al FEDERACIO ESPERANTO DE BHARATO, 35/1 SWAMI VIVEKA - NANDA ROAD, HOWRAH - 711 101, BHARATO- INDIA."

# UN KAJ NI

INTERNACIA JARO POR PACO - 1986

Per sia rezolucio 37/16 de la 1982, novembro 16, la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝinta Naciaro deklaris la jaron 1986 Internacia Jaro por Paco. La ĝenerala sekretario de UN alvokis ankaj al Neregistaraj Organizoj partopreni la agadon lige kun la Jaro. Universala Esperanto-Asocio entuziasme aliĝis al tiu gravega iniciato, kiu tiel forte kongruas kun la celoj kaj prioritatoj de UEA, precipe la akcelo de internacia interkompreniĝo, kaj ĝi jam akceptis Laborplanon por ĉi tiu jaro. Pri tiu plano vi legos en la Starto 1/85.

La VIIIa Ĉebalta Esperantista Printempo

okazos ekde la 23a ĝis la 29a de majo 1985 en Mielno/Pollando/-ĉemara ripozloko 12 km de urbo Kozsalin . Supozebla kosto estas 5.000 Zł.

Ni deziras al niaj legantoj trankvilan, pacan kaj sukcesan novan jaron 1985kaj antaŭe ni dankas por eventualaj salutoj kaj bondeziroj.

sekretariejo kaj redaktoro

---

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,Jilská strato 10, 110 00 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6 foje jare. Responda redaktoro Zdenko KŘIMSKÝ. Grafika aranĝo Milan LABAŠTA. Desegnaĵoj Pavel RAK. Transdonita al presejo la 21-an de novembro 1984. Jarabono Kčs 24,--, por eksterlando Kčs 36,-- aŭ 10,50 gld., inkluzive sendkostojn.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu,Jilská ul. 10, 110 00 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Odpovědný redaktor Zdenko KŘIMSKÝ. Grafická úprava Milan LABAŠTA. Kresby Pavel RAK. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven, Praha.Předáno do tisku dne 21.listopadu 1984.Roční předplatné Kčs 24,--,pro zahraničí Kčs 36,-- nebo 10,50 guldenů,včetně poštovních výloh. Dohlédací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovné povolen Ředitelstvím pošt Praha pod č. jedn. P/1 - 1267 ze dne 6. dubna 1979.



KOVOVÉ
METALAJ REMIZOJ
GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbotavolo - duparta pordego - deklina tegmento - sen planko - facila muntado aŭ sur submuro aŭ sur ebena tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Larĝo 3030 mm alto 2450 mm estas egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malonga tempo 1-2 monatoj liveras

INKLEMO
PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adreso de komerca fako: INKLEMO PRAHA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA 9, Spojovací 11, aŭ telefonu al n-ro 83 09 49. Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la kooperativo. Transporton ni povas certigi. Remizojn ni liveras nur al privatuloj.

Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10

Noviny

DOHLÉDACÍ POŠTA PRAHA 07,
SNÍŽENÝ POŠTOVNÍ POPLATEK
POVOLEN ŘEDITELSTVÍM POŠT PRAHA
J.ZN. P/1 - 1267/79 ZE DNE 6.4.1979